Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 22 — Trimonata

4/92

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Instruista trejnado nia prioritato (Novjara mesaĝo de la prezidanto)..... 1
KERESTHEGYI, Tivadar, Intensive–de mateno ĝis malfrue en la nokto..... 4
VILISICS-FORMAGGIO, Elisabetta, Interkompreniĝi, sed kiel?..... 5
Edukado por la 21a jarcento (raporto de Unesko) 16
CHARTERS, Duncan, Intensiva kurso por instruistoj 17
Aliĝilo por tri instruistaj kursoj en 1993..... 19
ROSBACH, Johan Hammond, Lernolibroj sub lupeo..... 20
Eŭropemaj instruistoj havas kuntekston (magazino Context) 26
MATTHIAS, Ulrich, Propono por la lingvopolitiko..... 28
Pedagogia Kalendaro por 1992 (feb – aŭg)..... 29
KURUCZ, Géza, Internacia konkurso pri modela E-parolo 30
MACGILL, Stefan, La debato pluiras – sed unuflanke..... 31
Aktivecoj el landoj kaj sekcioj..... 34, 38
Recenzoj (doktoriga disertacio, revuoj, legolibroj)..... 35
Post-skribo-table 40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MacGill, Eso u 7 III, H-1034 Budapest, Hungario. Mesaĝoj tra HEA: (36 1) 1560 244. *Kunordigo, planado, eldonado, rilatoj kun UEA kaj la movado.*

Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb- Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio.*

Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongingun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüell, Germanio. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Novjara mesaĝo de la prezidanto de ILEI:

Instruista trejnado nia prioritato

En la jaro 1993, ILEI volas klare meti la emfazon sur instruistan trejnadon. Antaŭ unu jaro sur ĉi tiuj paĝoj ni elkalkulis la proksimuman instruadan bezonon por pluvivigi parolkomunumon de miliono da homoj, praktike sen denaska fonto de novaj parolantoj. Ni taksis, ke necesus logi ĉ. 200.000 homojn al komencantaj kursoj ĉiujare por rikolti 40.000 parolantojn kaj uzantojn. Tio postulas konstantan popolon da 10.000 instruistoj. Por teni tiun popolon stabila necesas trejni ĉ. 500 novajn ĉiujare, kio postulas krei kernon de almenaŭ dudek instruisto-trejnistoj.

Niaj enketadoj tra du jaroj trovis ĉ. 10.000 kursanojn. Se ni bonkore supozas ke eskapis nian atenton pliaj 10.000 kursanoj, tamen tio respondas al nur dekono de la bezono. Alivorte, la kvanto de konata instruado, duobligita pro sciomanko, sufiĉas nur por teni popolon de ĉ. 100.000 homoj – malkontentiga kaj riske malgranda nombro por pluvivigi diasporan lingvo-komunumon.

Ŝlosilo al kresko estas instruista trejnado. ILEI ne havas la forton tuj atingi nivelon trejni 500 instruistojn jare, ĝi tamen starigis al si la defion proponi 50 lokojn en instruistaj kursoj en 1993 kaj 100 lokojn en 1994. Komencan modestan paŝon ĝi prenis per okazigo de tri-taga intensa kurso pri komunika instruado en la Esperanto-Centro Poprad (Slovakio) en novembro. Ĝi logis nur ok partoprenantojn, tamen el kvar landoj kaj la plimulto praktikantaj instruistoj.

En 1993 ni proponos almenaŭ tri kursojn. D-ro Duncan Charters, brito vivanta en Usono, gvidos la plej ampleksan du-semajnan en Kultura Centro Esperantista (KCE) en Svislando de la 9a ĝis la 17a de julio. Li profesie trejnas lingvo-instruistojn sude de Ĉikago, cirkulas en avangarda eduka medio kaj aplikas la plej modernajn konceptojn kaj alirojn. Detalaj informoj kaj aliĝilo troviĝas meze de ĉi tiu IPR.

La Poprada kurso bazita sur la lernolibro *Tendaraj tagoj* estos ripetita; gvidantoj por pliaj kursoj certe ne mankas (Barcsay, Dahlenburg, Koutny, Smidéliusz, Szanser k.m.a.)

La malmultaj aliĝintoj en Poprad kaj en pli fruaj kursoj bezonas analizon. Kial niaj instruistoj ne aliĝas multnombre? Kelkaj respond-provoj:

- Problemo ricevi forpermeson de lernejo ekster ferio-periodoj;
- Tro da konkurencaj aranĝoj en la ferio-periodoj;
- Maleblo pagi la vojaĝ- kaj restad- kaj kurso-kostojn;
- Kontenteco pri la nuna instru-metodo kaj -sperto.

Ŝajnas, ke ILEI sukcesos oferti 50 kurs-lokojn en 1993, sed pli debateblas la kapablo trovi 50 taŭgajn kursanojn en la nunaj malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj.

Do, necesas trovi alian publikon. Ni spertis en niaj pli fruaj kursoj, se entute venis pli ol manpleno, ke la plimulto fakte ne estas profesiaj instruistoj, kaj kursumas pro devo instrui en klubo aŭ grupo. Ni ja ĝojas pri la partopreno de tiaj kursanoj, sed ne ilin ni volas unuavice atingi.

Necesas fari kursojn ne nur por niaj ekzistantaj instruistoj, sed ankaŭ por novaj, (ĉu de fremdaj lingvoj, ĉu de pacaj aŭ sociaj studoj) kiujn ni devos konvinki eklerni Esperanton. Tio postulas multan kunlaboron inter la internacia ILEI kaj enlandaj aktivuloj en la sekcioj. Multaj el tiuj varbeblaj instruistoj jam majstras modernajn instru-teknikojn. Esence la enlandanoj devas informi ilin nacilingve pri la ebloj de la lingvo kaj proponi kurson. La internacia ILEI povos kontribui ĉefe en la realigo de tiu kurso.

En ĉi tiu tuta tereno kelkaj bazaj paŝoj necesas:

- Havigi por niaj movade organizitaj kursoj minimuman agnoskon ĉe edukaj instancoj, tiel ke instruistoj estu liberigitaj kun salajro por partopreni. ILEI tra la sekcioj devos strebi je tio landon post lando.
- Disponigi lokojn en tiuj kursoj preskaŭ senpage por instruistoj kun nesufiĉaj propraj rimedoj. Tiom urĝe ni bezonas kvalifikitajn instruistojn, ke la movado devus preti subteni kurs-partoprenon ne nur al tiuj, sed al ĉiu ajn instruisto, kiu havos la kondiĉojn poste adekvate instrui la lingvon. Sed konvinki la movadon pri la urĝeco investi en instruistoj ŝajnas tre malfacila tasko.
- Organizi kursojn ne nur en E-Centroj, sed ankaŭ laŭ oficiala sankcio en centroj de naciaj aŭ aliaj edukaj instancoj, kadre de la normala programo de instruista trejnado aŭ plutrejnado. Ni rezignu pri ĝeneralaj rezolucioj pri tuja enkonduko de Esperanto. Ni klopodu pri limigita enkonduko en kelkaj lernejoj, post oficiala kaj profesieca trejnado de instruistoj por tiuj klasoj.
- Kompili registron de eblaj gvidantoj de instruistaj kursoj. Ĉiu skizu la specojn da kursoj proponeblaj, kun diversaj daŭroj, cel-grupoj kaj instru-metodoj kaj ankaŭ la kondiĉoj bezonataj. Tiun katalogon ni povos proponi al landaj asocioj kaj E-Centroj. Ni jam listigas vizitemajn instruistojn, kaj tiujn ni en la sama katalogo povos prezenti.
- Sisteme starigi reton da homoj, kapablaj trejni la instruisto-trejnistojn. Tiun temon grupo de ILEI-anoj diskutos kun d-ro Charters somere.

Lige al la dua punkto, ni anoncas tri stipendiojn por partopreno en la kurso de d-ro Charters, kiuj kovros 80% de la restad- kaj kurso-kostoj. Per la aliĝilo povas kandidatiĝi tiuj, kiuj nun aktive instruas la lingvon en lernejo, aŭ kiuj ekfaros tion tuj post la kurso. Ni volas oferti similajn stipendiojn (ĝis sep) por kursoj en Poprad. Laŭ nia nova mur-trarompa politiko, favoraj aliĝebloj ekzistos por reform-eŭropanoj en hungaraj forintoj kaj ĉeĥ-slovakaj kronoj por ĉiuj kursoj, ankaŭ tiu en Svislando.

ILEI faros sian eblon parte financi tion el siaj liliputaj rimedoj, KCE promesis simile kontribui. Sed necesas memori, ke la granda plimulto de la mova-

daj rimedoj kuŝas ĉe UEA. Ĝia jara spezaro estas pli ol la dudekoblo de nia kaj ĝia kapitalo la kvardekoblo. Sekve, farante nian ĉiujaran kalkulon al UEA por financa disponigo ni malaltigis nian kutiman proponon de 3000 NLG al 2000, por peti, laŭ invito de la rezolucio de ĝia Komitato en Vieno, 2000 NLG specife por stipendioj al instruistaj kursoj. Ni fidas je sukceso de ĉi tiu iniciato.

Ne decus adiaŭi 1992 sen mencii la sukcesan lanĉon de la Gimnazio dum nia Konferenco en Bratislavo. Ĝi celas kontraŭ-labori la grandan kursfinan perdon de lernejanoj – la plimulto neniam trovas sian vojon en la lingvo-komunumon. Ĝi pozitive influis la etoson de la Konferenco, kiu plie memorindas pro la zorga preparado de ĝia faka programo (inkluzivante Cseh-seminarion). Spite kelkajn loĝigajn, klimatajn kaj komitatajn zorgojn, multaj esprimis sin pozitive pri la aranĝo – ĝi estis la plej granda kaj plej internacia kaj malplej poŝdetrua dum la lastaj jaroj. Ni ĝojas povi oferti la 27an Konferencon je la samaj poŝoplaĉaj tarifoj.

Indas ankaŭ elstarigi la kreskon de *Juna amiko*, kiun ILEI nun prizorgas. Por festi ĝian dudek-jariĝon, anstataŭ 24 paĝoj, ĉiu numero havos 32 kaj povos pli taŭge enteni ion allogan por ĉiu aĝ-grupo inter 5 kaj 15 jaroj. Spite la perdon de pliaj 800 abonantoj (ĉefe en Bulgario, Rumanio, Hungario kaj Brazilo) la revuo finis la jaron kun eta financa pluso – sed nur dank' al tri gravaj subvencioj: de Fondaĵo Grabowski (530 USD), la Hungara Ministerio pri Kulturo kaj Klerigo (150.000 HUF) kaj HEA (12.000 HUF).

Dum la jaro ni starigis modestan oficejon, libroservon, akiris laseran printilon kaj regule honorarias helpanton, kiu jarfine iĝas help-redaktoro kaj ekspedestro de *Juna amiko*. Aperis la dua kajero de *Tendaraj tagoj* kaj elĉerpiĝis la unua. Okazis ekzamenaj sesioj en Ĉinio, Bulgario, Vieno, San-Francisko kaj La Chaux-de-Fonds kaj la Komitato de UEA akceptis regularon pri la superaj ekzamenoj. Ni aldonis du landajn sekciojn, kaj reprezentantojn en oko da landoj. Ni rilatadas kun Unesko kaj UN kaj aliaj edukaj eldonaĵoj kaj asocioj.

Por kreski plu ni bezonas pli grandan membrobazon kaj pli da helpantoj. Necesas rekomendi membrecon en ILEI al ĉiu, kiu instruas, okupiĝas pri edukado aŭ komprenas ĝian gravecon al nia movado kaj komunumo. Ni povas fieri pri *Internacia Pedagogia Revuo*, kiu portas valorajn fakajn artikolojn, strategiajn debatojn, kaj praktikajn informojn.

Ni estas konvinkitaj, ke kohera programo de instruista trejnado estas ŝlosilo al kresko kaj progreso. Ĝi estos nia prioritato 1993. Per daŭra aneco en ILEI kaj kunlaboro en nia agado, vi povas esprimi konkrete vian konsenton pri tio.

Ĉion plej bonan por la nova jaro deziras,

Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI.

Konciza versio de ĉi tiu mesaĝo iris novembre al trideko da movadaj gazetoj.

Kurs-raporto:

INTENSIVE — de mateno ĝis malfrue en la nokto

Inter la 6a kaj la 9a de novembro 1992 okazis la unua intensiva kurso pri komunika instruado bazita sur la lernolibro *Tendaraj tagoj*, gvidata de ĝia aŭtoro en la slovaka urbo Poprad.

Post la alveno en la Esperanto-Centro de Slovakia E-Asocio, la partoprenintoj tuj sinprezentadis kaj komencis la studadon. Dum la kurso ni trastudis dek ok sesiojn. La kurso havis bonegan etoson, kulminante en la rol-ludado, kiam la kursanoj, kiel verkintoj, sursce nigis la proprajn verkojn helpe de la ceteraj kursanoj, kiuj ne sciis la intencitan celon. La kurson sekvis geinstruistoj el Hungario, Pollando, Slovakio, kaj Kroatio.

S-roj Milan Zvara, Anton Zachariás kaj iliaj taĉmentetoj eminente aranĝis la kondiĉojn de la restado kaj la kurso. Ni dankas la altnivelan vere intensivan kurson al ili kaj la gvidanto.

Tivadar Keresthegyi, Hungario.



En mallonga interrompo inter du laborsesioj paŭzas poze la laborintoj, en la ĉefa studoĉambro omaĝe nomita Salono Sekelj. De maldekstre starante: s-inoj Danuta Kwiatek, Zabrze, Pollando; Jadviga Novak, Vroclavo, Pollando; s-ro Tivadar Keresthegyi, Budapeŝto, Hungario; Anton Zachariás, Poprad; Jarmila Rechtorisová, Bratislavo, Slovakio; Stefan MacGill, Budapeŝto (la gvidinto). De maldekstre sidante: s-inoj Teresa Pomorska, Vroclavo, Pollando; Magdi Juhász, Budapeŝto, kaj Viŝnja Brankovic, nun el Poprad.

Sama kurso en 1993: 27– 30 majo kaj 14–17 oktobro; ambaŭ de ĵaŭda vespero ĝis dimanĉo tagmeze (la dua paralele kun Aŭtuna Esperanto-Lernejo, tiel ke la kursanoj povos gvidi verajn lecionojn). Aliĝilo en la mezaj paĝoj de la nuna IPR; kursskemo en la antaŭa IPR!

Interkompreniĝi, sed kiel?

Raporto pri internacia lerneja enketo rilate la lingvan komunikadon kun alilandanoj

Elisabetta Vilisics-Formaggio (I)

1. La demandaro


La enketo disvolviĝis en 21 mezgradaj lernejoj fine de la '80-aj jaroj en Francio, Germanio, Hungario, Italio, Katalunio kaj Ukrainio. La demandaro, redaktita en Italio kaj tradukita al la lingvoj franca, germana, hungara, kataluna kaj rusa, konsistis el du ĉefaj partoj:


- tra la unua serio de demandoj la geknaboj estis gvidataj konstrui bildon pri la propra lingva situacio kaj por pritaksi laŭ praktika vidpunkto sian komunikan pretecon kun alilingvuloj,
- en la dua parto la enketitoj estis invitataj rezonadi kaj esprimi siajn opiniojn pri kelkaj aspektoj de la internacia lingva komunikado kaj pri la eblaj solvoj de la plej evidentaj problemoj.


La celo de la demandaro estis duobla: unuflanke alvoki kaj fokusi la atenton de la gelernantoj al temo ĝenerale neglektata, aliflanke akiri bildon pri la lingva konscio kaj komunika preteco de diversnaciaj gejunuloj, pri iliaj konoj, opinioj kaj deziroj rilate la interkomunikadon.

2. La respondintoj

Respondis 2276 gelernantoj el 6 landoj. Ilia disdivido laŭ nacieco,aĝo, sekso kaj lernejtipo estis la jena:







3. La respondoj

Sekso: knaboj 53%
knabinoj 47%

3.1 Lingvaj spertoj en la familio

La ĉefaj naciaj lingvoj parolataj en la familioj de la respondintoj estas la itala, franca, germana, kataluna, hungara kaj rusa. Proksimume dek geknaboj el cento estas du-lingvuloj, ĉar en iliaj familioj oni uzas ne nur la ĝenerale parolatan lingvon de la loĝ-loko. Temas pri kelkaj diversetnaj enmigrintoj: turkoj,

grekoj, hispanoj, jugoslavianoj, poloj, nordafrikanoj, ktp. en Germanio kaj en Francio, kaj pri loĝantoj de plurlingvaj ŝtatoj: katalunoj en Hispanio kaj ukrainanoj en Sovetunio.


En Barcelono kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo 81% de la koncernaj familioj uzas kutime la katalunan lingvon, la aliaj plej ofte la kastilian, aŭ ambaŭ lingvojn alterne. Laŭ la respondoj de kievanoj 75% de ili parolas hejme kaj lerneje la rusan. Nur unu kvarono de la familioj uzas ankaŭ la ukrainan lingvon.

3.2 Lingvaj spertoj en la lernejo

En la lernejo ĉiuj pridemanditoj studis almenaŭ unu fremdan lingvon deve, mezume dum kvin jaroj kaj duono. Pli ol la duono estis lernanta duan, eĉ trian fremdan lingvon kiel devigan stud-objekton de mezume du jaroj. La instruataj lingvoj estas la angla, franca, germana, hispana kaj en gimnazioj ankaŭ la latina. Esperanto estis menciita nur de hungaroj.


Preskaŭ la duono de la intervjuitoj lernas iun lingvon ankaŭ ne deve por plibonigi aŭ por kompletigi la lernejan studadon.

Lingvoj deve lernataj



La plej grandnombre lernata lingvo de ĉiu nacio estas la angla. Tiuj junuloj, kiuj ne havas ĝin inter la devigaj studobjektoj, plejparte prenas apartajn lecionojn memvole. Notinda kvanto lernas la anglan kaj lerneje, kaj private.

Lingvoj fakultative lernataj




La germanaj kaj la francaj respondintoj studas en la lernejo samproporcie la reciprokan lingvon, (50%-48%). Tia reciprokeco ne montriĝas en la rilato franca-itala. Dum el la italoj 77% lernas la francan, inter la francaj geknaboj nur 2% indikis la italan kiel lernejan objekton. En Hungario la germana okupas la duan lokon en la vico de la instruataj lingvoj postsekvante tute proksime la anglan. Demando pri reciprokeco estus absurdaĵo... Al la hispana dediĉas sin entute 2% de la enketitoj lerneje, kaj 15% private.

Esperanto estas menciita nur de hungaraj lernantoj, el kiuj 1% lernas ĝin lerneje, kaj 3% en eksterlernejaj kursoj.

Kiel akceptas la geknaboj la devon lerni fremdajn lingvojn?

Nur malgranda parto grumblas pro ĝi. Alia ne-granda grupo konsideras la lingvon neevitebla lernobjekto senproteste akceptenda. Proksimume du trionoj taksas pozitive la lernejan lingvo-lernadon konvinkitaj pri ĝia praktika utilo, kaj pluraj el ili trovas eĉ plezuron en ĝi.

Lingvolernado:



Inter tiuj, kiuj ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn aparte alta estas la nombro de kievanoj, kiuj dubas pri la utileco de tiaj penoj.

3.3 Lingvaj spertoj en la praktiko

Tre multaj el la intervjuitaj gelernantoj havis jam okazon interparoli kun eksterlandanoj. Pri tio raportis:


94% de la katalunoj	91% de la hungaroj
94% de la germanoj	87% de la italoj
93% de la francoj	63% de la ukrainanoj.

En tiuj kazoj sufiĉe ofte ili uzis la propran gepatran lingvon (entute 35% menciis tion), kaj pluraj konfidas, ke ili helpis sin per gestoj kaj mimado (27%), tamen plej ofte ili klopodis utiligi iun fremdan lingvon. Statistike la duono de ĉiuj pridemanditoj uzis en la praktiko, pli-malpli efike, iun el la lernataj lingvoj. 50% de tiuj indikis la anglan, 11% la francan, 9% la germanan kaj 10% iun alian.

Propralingve komunikis plej nombre la ukrainanoj, (temas pri la rusa). Plej ofte uzis "manojn kaj piedojn" por sin komprenigi la hungaroj. Plej vaste aplikis la fremdajn lingvojn la germanoj kaj la francoj.

Ĉu la interkomunikado estis facila?

El la 1980 geknaboj, kiuj havis jam praktikan sperton, 68% respondis negative.



Plej multnombre plendis la ukrainanoj, (81%). El la italoj 77% kaj el la hungaroj 71% raportis pri malfacilaĵoj. Ankaŭ la katalunoj renkontis problemojn, pri tio informis 68 lernantoj el cento. El la francoj iom pli ol la duono estis malkontentaj. Plej kontentigaj estis la spertoj de germanoj: tri kvaronoj de ili raportis pri glata interparolado.

3.4 Deziro pri rekta kontakto kun alinaciano

99% de la enketitoj ŝatus iri eksterlanden.

Kien kaj kiu-cele?

Rilate Eŭropon klare montriĝas, ke laŭ la respondintoj nur la okcidenta parto de la kontinento indas viziton. La ĉefa cellando estas Anglio (kelkfoje indikita kiel Granda Britio), sen rivalo. La dua, sed post longa, longa distanco, estas Francio. Sekvas Italio. Kaj poste Germanio, kiu interesas unua-vice francojn kaj hungarojn. Menciitaj estas ankoraŭ de apenaŭ konsiderebla nombro Hispanio kaj Grekio (ĉefe de norduloj), kaj Nederlando kun Skandinavio (ĉefe de suduloj).


Centraj kaj orient-eŭropaj ŝtatoj interesas nur 3 procentojn, sed temas preskaŭ en ĉiu kazo pri Jugoslavio. La interesiĝantoj estas antaŭ ĉiuj gefiloj de

elmigrintoj, kiuj sentas scivolon pri la tero kaj popolo de siaj gepatroj. Tiu tendenco estas rimarkebla ankaŭ ĉe samsituaciaj alinacianoj. Alia lando de la "orienta bloko" kiun menciis proksimume 12%, estas Sovetunio. Neniam estis indikita, ĉu la eŭropa parto aŭ la azia allogas la geknabojn. En tiu ĉi kategorio estas kalkulitaj ankaŭ la mencioj "Rusio". La elektintoj de tiu ĉi ŝtato estas ĉefe germanoj kaj francoj. Ekster Eŭropo la granda revo estas Usono. Proksimume la duono de la gelernantoj revas pri vizito al tiu lando, kun 81% de la germanoj, kiel maksimumo kaj 25% de hungaroj, kiel minimumo. Inter la ceteraj ekstereŭropaj landoj, laŭvice longe post Usono, la unuan lokon okupas Aŭstralio, sekvate de miksaĵo de plej diversaj "ekzotikaj" landoj aziaj kaj sudamerikaj. La kontinento preskaŭ neglektita estas Afriko.

Kial iri al aliaj landoj?

Nur malgranda parto de la gelernantoj (21%) montris intereson pri artaj kaj historiaj trezoroj de la cellando. La plej multo de tiuj konsistas el hungaroj.

Interesoj eksterlande



Pli multnombra grupo (29%) estas allogata de specialaj varoj troveblaj ekster sia ŝtato. Antaŭ ĉiuj la ukrainaj geknaboj (48%), sed ankaŭ sufiĉe alta procento de francoj (41%) kaj hungaroj (38%). Pli ol la duono de ĉiuj enketitoj deziras *vidi* la vizitatan landon, admiri la pejzaĝojn kaj konatiĝi kun famaj urboj.


Alta estas la nombro de tiuj, kies celo estas alproksimiĝi al la loĝantaro: 49% montris intereson pri la ĉiutaga vivo de la homoj, kaj 53% ŝatus starigi amikajn rilatojn kun samaĝuloj.

Dum la vidindaĵoj estas ĝueblaj ankaŭ sen la kono de la loka lingvo, kaj por butikumi sufiĉas nur kelkaj vortoj kaj gestoj, la interhomaj rilatoj, la partopreno al la ĉiutaga vivo estas neimagebla sen lingva interkompreniĝo.

Ĉu la enketitaj gejunuloj sentas sin lingve pretaj por akiri ladeziratajn celojn?

31% de ili respondis pozitive. Plej certaj estis la germanoj: pli ol la duono el ili jesis. 3% de la pridemanditoj estis dubaj. 66% deklaris, ke iliaj lingvaj konoj ne sufiĉas por kontentiga interkomunikado. La plej multaj el tiu ĉi grupo estas la hungaroj kaj la italoj. Respektive 81% kaj 79% el ili estis malkontentaj pri sia komunika kapablo.

Ĉu lingve preta?



3.5 Opinioj pri la interkomunikado de diverslingvanoj

Pli ol la duono de la gelernantoj neniam pensis antaŭe pri tiu ĉi temo. La plej multnombre konsciaj pri la problemo estis la katalunoj. La plej surprizitaj pri la demando estis la italoj.

Rilate la konkretan demandon, "*ĉu la lingva malsameco malhelpas la interpopolajn rilatojn?*" la jesaj kaj neaj respondoj ĉe ĉiu nacia grupo estis preskaŭ egalnombraj, krom la italoj, kies 71% jesis. Proksimume la duono de ĉiuj responditoj pensas, ke por interrilatiĝi sufiĉas la intenco, la lingvajn barojn iel aŭ aliel oni transgrimpas. Ili lernas ja fremdajn lingvojn, kaj iliaj samaĝanoj en ĉiuj aliaj nacioj faras la samon en la lernejo. (Pri tio 68% certas, 21% ne havas ideon, 9% neas).

Ĉu iu komune uzata helplingvo ne povus tamen plifaciligi la interrilatojn? – demandas la enketilo. 62% pensas, ke jes, 19% neas kaj 19% ne esprimis opinion.


La gelernantoj estis invititaj imagi, kiajn avantaĝojn ili havus, se tiu internacie uzata komunikilo estus ilia nacia lingvo. La plej nombra grupo estas tiu, kiu opinias, ke la plej bela afero estus en tiu kazo, ke ili posedus ekde la naskiĝo universalan komunikilon sen iu ajn peno. Por la hungaroj kaj por granda parto de la katalunoj plej bele estus tiukaze neniam ŝajni aŭ senti sin malpli valoraj pro pure lingvaj kaŭzoj. Konsiderinda parto de la hungaroj pensas pri la gajnebla tempo por aliaj utilaj kaj interesaj aferoj. Nur laste estis menciita kiel avantaĝo, ne lerni deve fremdajn lingvojn. Tion aparte aprecus la kievaj respondintoj.

Proksimume tri kvarono opinias, ke la ŝtato, kies lingvo estas internacie uzata, ĝuas avantaĝojn. Plej multe el ili pensas pri kulturaj avantaĝoj, iom


Jam cerbumis pri la temo




Ĉu la lingva diverseco malhelpas?




Ĉu ĝenerale akceptita internacia lingvo helpus?



La plej grava avantaĝo, se via nacia lingvo estus la internacia:



Ĉu la ŝtato, kies lingvo estas internacie uzata, ĝuas avantaĝon?



malpli ol la duono pri ekonomiaj kaj unu triono ankaŭ pri politikaj. Sufiĉe alta estas la nombro de tiuj, kiuj ne havas opinion pri la temo.


Sendepende de la nacieco mezume 75% de la gelernantoj pensas, ke ilia gepatra lingvo ne povus iĝi la ĝenerale akceptita internacia lingvo. Hungaroj kaj italoj unuavice, poste germanoj kaj katalunoj, laste francoj kaj ukrainanoj.

Duono de tiuj vidas la kaŭzon en la malfacileco de sia nacia lingvo. Antaŭ ĉiuj la germanoj (94%) kaj la francoj (76%). Alian gravan kaŭzon ili vidas en tio, ke la koncernaj lingvoj ne estas parolataj de multaj homoj. Tiel argumentas ĉefe la katalunoj (79%) kaj hungaroj (53%).

Tiuj malmultaj, kiuj opinias, ke ilia lingvo povus havi ŝancon, kiel iu ajn alia lingvo, por iĝi la internacia, argumentas ĝenerale per la riĉa kulturo, kies portanto la koncerna lingvo estas.


Nur malmultaj gelernantoj kredas, ke la politika kaj ekonomia potenco de iu ŝtato havas rilaton kun la internacia uzo de ties oficiala lingvo.


La duono de la enketitoj pensas, ke la ŝtatoj neniam interkonsentos pri la elekto de iu nacia lingvo por komuna uzo en la internaciaj rilatoj. Pri tio preskaŭ unu kvarono ne havas opinion kaj nur la restanta kvarono esperas pri interakordiĝo.



Kiun solvon favorus la enketitoj?


Plejparte ili opinias, ke plej ĝuste estus elekti la lingvon, kiun jam parolas la plej multaj homoj (54%). Malpli nombraj estas tiuj, kiuj preferus taŭgan, neŭtralan planlingvon, (36%). Nur malmultaj kredas, ke la lingvo de la plej progresinta nacio estu ĝenerale uzenda. La revivigon de antikva lingvo preskaŭ neniu konsideris.





La gelernantoj estis invititaj pripensi, kiujn pozitivajn rezultojn povus doni la enkonduko de simpla, regula, neŭtrala planlingvo. Nur 7% neglektis la demandon. 50% esprimis la opinion, ke la plej grava avantaĝo, kiun tiu solvo povus doni, estus la certigo de lingva egaleco en la internacia komunikado. Aliaj avantaĝoj, kiel la ebleco de internacia kunordigo de la lerneja lingvoinstruado, aŭ la pli rapida alproprigo de lingva interkomunikilo, ne estis tiom konsideritaj. (23% kaj 19% resp.) 15% opiniis, ke enkonduko de planlingvo havus neniun pozitivan konsekvencon.

La duono de la pridemanditoj neniam aŭdis, ke ia neŭtrala kaj raciigita planlingvo ekzistas kaj estas jam uzata en internaciaj rilatoj. La alia duono jam havis supraĵajn informojn kaj 37% indikis la nomon "Esperanto".



La respondoj al la lasta demandoserio, kaj ĉefe la sufiĉe alta procentaĵo de opinio-manko, spegulas malcertecon pro neinformiteco. Fakte, 69% de ĉiuj enketitoj esprimis la opinion, ke la lingva interkomunikado en la mondo estas temo, kiu meritus pli profundan pritraktadon en la lernejo.

4. Konkludoj

4.1. Priskribo de la tipa respondinto (kun komentoj)

Post la sumigo de la rezultoj staras antaŭ ni 16 – 17-jara lernanto.
(Kiel konate, la duono de la respondintoj estas inoj. Por simpligo ni uzos ekde nun la viran formon en ĝenerala senco.)

Nia tipa lernanto povus esti ano de unu aŭ de alia ŝtato, kie la enketo disvolviĝis. Determinanta estas nur la fakto ke li apartenas al popolo ne-anglalingva.

Li finis la ĝenerale devigan lernperiodon laŭ la leĝoj de sia loĝlando, kaj daŭrigas la studadon en la meza ŝtupo de la instrusistemo. Li jam dediĉis proksimume 1000 horojn al la diligenta lernado de la angla lingvo. (Estas kal-

kulitaj 3 lernejaj horoj semajne dum 30 semajnoj jare en 5,5 jaroj, tio estas 495 horoj, kiuj duobligis tra la hejmaj taskoj kaj ekzercado.) Li faris tion devigate de la lerneja programo, sed volonte, kun la certeco ke la kono de fremdaj lingvoj estas utila afero. En la lastaj du lernojaroj li eklernis laŭdeve ankaŭ duan fremdan lingvon, kaj tiucele li jam elspezis proksimume 350 horojn. Li estas konvinkita, ke ĉiuj samaĝaj lernantoj en la mondo dediĉas sin simile al lingvaj studoj. (Se li aŭdus de angla-lingvaj samaĝuloj, ke ili estas liberaj de tia devo kaj – dum li pene klopodas alproprigi ilian lingvon – ili perfektigas en aliaj studkampoj, li ege mirus.)

Li havis jam okazon utiligi la lernatajn lingvojn kun eksterlandanoj, sed pri la praktika rezulto li ne estas kontenta. (Paciencon! Li sidos ankoraŭ kelkajn jarojn en la lernejo, tio estas pluaj centoj da horoj tra lingvolecionoj kaj hejmaj ekzercoj. En kazo de neceso li enskribiĝos en iun eksterlernejan kurson aŭ li prenos privatajn lecionojn. La gepatroj tre verŝajne pretos pri tiacelaj financaj oferoj, ili ja konscias, kiom grava estas bona lingvokapablo.)

Nia tipa respondinto sopiras pri vojaĝoj al eksteraj landoj. Kien? En Anglion antaŭ ĉio kaj en Usonon, kompreneble. Kiucele? Por admiri propra-okule la vidindaĵojn, por viziti la fame konatajn urbojn, por enmergiĝi en la vivon de ties loĝantoj, por interamikiĝi, riĉiĝi je spertoj tra rektaj, personaj rilatoj.

Kaj kien ankoraŭ? ...Nu, eble en Francion. Se li kuraĝas uzi la fantazion, ni aldonas ankoraŭ liston de por li ekzotikaj landoj. Najbaraj popoloj ne interesas lin.

Li konscias pri tio, ke liaj lingvaj kapabloj ne estas ankoraŭ sufiĉaj por alfronti sen problemoj la deziratajn travivaĵojn eĉ se en la cellando oni parolas la lingvon, kiun li lernas jam de pluraj jaroj. (Onidire mankas al li surloka praktikado. Necesus partopreni en organizitaj studferioj, estas ja centoj da proponoj el Britio kaj el Usono, kelkaj eblecoj prezentiĝas ankaŭ en Francio kaj en Germanio, se tio interesas iun. Sed ĉu la mezuma familio de nia mezuma lernanto posedas la rimedojn por financi tiajn multekostajn aranĝojn? Pri tio ni ne havas informojn. La duboj de la komentanto baziĝas nur sur la spertoj en sia propra medio.)

Malgraŭ la sufiĉe objektiva prijuĝo de la propra lingva situacio, nia tipa respondinto ne multe cerbumis antaŭe pri la interkomunikadaj problemoj en la mondo. (Nek lerneje, nek ekster ĝi li ricevis stimulojn por tion fari.) Laŭ lia opinio povas esti, ke la lingva malsameco malhelpas la interrilatigon de la popoloj, sed li ne taksas tion grava problemo. (Tre probable li inklinas al la plej kutima opinio en la plenaĝula mondo: la babela situacio estas plurjarmila realaĵo, la solvo de la ĉiamaj problemoj estas afero de la tradukistoj, interpretistoj, lingvoinstruistoj.) Post iom da rezonado li konsentas tamen pri tio, ke iu komuna akordo rilate la uzon de unu sola internacia lingvo estus ĉiukaze pli racia aranĝo.

Sed kies lingvon elekti?

Li pensas, ke denaske posedi universalan ilon, kiujn aliaj akiras nur post longa penado kaj monelspezoj, estas granda avantaĝo por iu ajn, kaj laŭ lia opinio la ŝtato, kies oficiala lingvo estas internacie uzata, havas favorplenan situacion kaj influforton super la aliaj. Sed li ne kuraĝas imagi sin kaj sian nacion en tia hegemonia pozicio. Li certas, ke lia propra lingvo ne taŭgas por internacia uzo, ĉar ĝi estas ...tro malfacila. Tion montras, laŭ lia opinio, la fakto mem, ke lia lingvo ne estas parolata de multaj alinacianoj. Li voĉdonas al la lingvo, kiu estas jam plej vaste uzata. (Ĉu konformisme? Ĉu realisme? Ĉu demokratisme?...Ni esperu, konsiderante lian junan aĝon, pri tiu ĉi lasta, ankaŭ se submetiĝi al la plimulto en tiu ĉi kazo estas false demokratie, tion ja li ne scias.)

Lia emo pri justeco kaj demokratio evidentiĝas ankaŭ en la pritakso de planlingvo, kiel eventuala internacia komunikilo. Li opinias, ke la plej grava avantaĝo, kiun simpla kaj neŭtrala pontlingvo povus doni al la popoloj, estas la egala respekto por ĉiu nacia lingvo kaj kulturo. Li aŭdis hazarde iam, ie, ion pri la ekzisto de ia tia, laŭcele planita internacia lingvo, verŝajne kun la nomo "Esperanto", sed la informoj lin atingintaj estas konfuzaj kaj apenaŭ priatentitaj.

Li respondis volonte al la demandoj de la enketilo, kiuj donis al li motivon por rezoni pri aferoj, kiuj antaŭe ne okupis liajn pensojn. Li atendas de la lernejo klarigojn pri la monda lingva situacio kaj interkomunikado. (Li bezonas kaj meritas taŭgan preparon por iĝi lingve egalranga partnero de ĉiu alinaciano, antaŭ ĉio en sia pli malvasta mondo: Eŭropo.)

4.2 Similaj kaj diversaj sintenoj de malsamaj naciaj grupoj

La hipoteza figuro, kiu en la supra priskribo reprezentas nian tipan lernanton, estis konstruata surbaze de la respondoj de la plejmulto (minimume 50%) de la pridemanditoj. La individuaj kompilaĵoj memkompreneble estas variaj.

Konsiderindaj diferencoj riveliĝas rilate al pluraj demandoj laŭ certaj kategorioj, ekzemple, knabinoj pli ofte difinis "plezura" la lingvolernadon ol knaboj, kiuj plejparte taksis ĝin "praktike utila".

La knaboj montris pli da interesiĝo pri la geografiaj aspektoj de iu vizitinda lando, la inoj scivolis pli multe pri la vivo de la loĝantaro. 18-jaruloj esprimis sin pli kompetente ol 15-jaruloj pri demandoj, kiuj tuŝis ne nur personajn, sed tutsociajn aspektojn de la interkomunikado. Ĉe metilernantoj oni rimarkas malpli da emo pri lingvolernado, ol ĉe gimnazianoj, kaj ili raportis pli nombre pri malfacila interkompreniĝo kun eksterlandanoj.

Tiuj ĉi kaj similaj diferencoj estas rimarkeblaj ĉe ĉiuj grupoj, sendepende de nacieco, sed oni povas malkovri ankaŭ tipe nacigrupajn sintenojn. Ekzemple la respondoj de francaj kaj germanaj lernantoj ofte estas notinde malsimilaj al tiuj de hungaroj, italoj kaj katalunoj. Estas signoj, kiuj permesas kredi, ke tiuj ĉi duaj estis pli disponeblaj rilate la enketon mem, sentante pli profunde la gravecon de la temo. Iliaj spertoj kaj opinioj estas determinitaj de ilia triagra-

da pozicio en la hodiaŭa lingva hierarkio. Kompare al ili francoj kaj germanoj havas sendube avantaĝon parolante jam denaske unu el la lingvoj, kiujn la aliaj lerneje studas. La plej favora situacio estas verŝajne tiu de la germanaj lernantoj, kiuj kaŭze de lingva parenceco pli facile alproprigas la anglan. Fakte, la gimnazianoj de Kolonjo deklaris sin plej nombre kontenta pri sia lingva preteco, kaj 67% el ili permesis al si la lukson lerni fakultative la plej diversajn lingvojn laŭplaĉe, dum la aliaj elektis ankaŭ memvole preskaŭ ĉiam la anglan, la francan aŭ la germanan. Escepto estis 21% ĉe la francoj, 2% ĉe la italoj, 4% ĉe la hungaroj kaj 0,5% ĉe la katalunoj.

Laŭ la enketrezultoj la hungaroj, simile al la katalunoj, aparte multnombre konscias kaj ĉagreniĝas pro sia "handikapiteco" en internaciaj rilatoj. Tia konscio rilate la propran lingvan pozicion riveliĝis nur ĉe malmultaj italoj.

La hungaroj "kun dentoj kunpremitaj" klopodas eliri el la lingva izoleco. Laŭ la liveritaj enketiloj ili superas ĉiujn alinaciajn grupojn rilate la fakultativan lingvolernadon. Ankaŭ la katalunoj montris sin diligentaj, dum la italoj ne multe hastas por plibonigi sian lingvo-nivelon. Bedaŭrinde la praktikaj rezultoj, kiel ni jam vidis en la 3-a ĉapitro, en ĉiuj kazoj estas nekontentigaj.

La ukrainanoj konsistigas apartan kategorion. Apartenantaj al popolo, vivanta en multnacia ŝtato, (la enketo okazis antaŭ la disfalo de Sovetunio), ilia situacio plej similis al tiu de katalunoj. Sed dum tiuj ĉi montriĝis grandnombre konsciaj pri sia etna identeco esprimata de sia etna lingvo, ĉe la kievaj lernantoj oni ne rimarkas ion similan. Ĉar laŭ longa tradicio hejme kaj lerneje ili parolas ruse, supozeble ili ne konas, aŭ konas malmulte la lingvon de siaj geavoj.

Estas malsimila ankaŭ ilia rilato al la fremdaj lingvoj. Mankis ĉe ili ia ajn motivo por lernado. Unuflanke ili konis jam denaske la "internacian lingvon" de la ĝishieraŭa Sovetio, aliflanke la kono de okcidentaj lingvoj por ili ne signifis praktikan utilon, ili ja havis malmultan aŭ nulan esperon transpasi la landlimojn. "Fremda lingvo" estis taksata de la plejmulto "deviga lernobjekto", pri kiu multaj esprimis malŝaton. Nedevigite neniu el ili lernis iun ajn lingvon. Du trionoj de ili renkontis jam alinacianojn, en tiuj kazoj ili preskaŭ senescepte klopodis interparoli ruse. La rezultoj laŭ la deklaroj de 81% estis seniluziigaj.

Pri la internacia lingva komunikado ili estas pli malmulte informitaj ol la alinaciaj grupoj, tion rivelas ankaŭ la rimarkebla malcerteco de iliaj opinioj.

4.3. Fina konkludo

La statistikaj eltiraĵoj prezentitaj kaj utiligitaj en tiu ĉi raporto rilatas principe la grupojn, kiuj partoprenis en la enketo, tamen ili entenas indikojn ankaŭ en pli vasta senco. Senduban valoron havas tiuj datumoj, kiuj nekontesteble montras ĝenerale validajn faktojn. Oni ne povas nei, ekzemple, la larĝe esprimitan deziron de la diversnaciaj lernantoj pri malfermiĝo al aliaj kulturoj, pri interrilatiĝo kun alilandaj junuloj. Estas klare ankaŭ, ke unu el la plej gravaj malhelpoj de ilia interkomunikado estas la ne-bona kono de fremdaj lingvoj

malgraŭ multjara lernado. La rezultoj de la enketo elmontras plie, ke la lerneja lingvoinstrua sistemo, puŝante la intereson de la lernantoj al difinitaj kulturoj, limigas la horizonton de niaj geknaboj. Riveliĝis, ke la orientiĝo al iu aŭ al alia popolo strikte rilatas kun la lerneja instruado de ties lingvo. Germanio kaj germanoj ekzemple meritas intereson nur laŭ francaj kaj hungaraj respondintoj, kiuj sufiĉe multnombre lernis la germanan. Pri Francio interesiĝis ĉefe italoj, germanoj kaj katalunoj, en kies programo la franca lingvo havas relative gravan pozicion. La sekva tabelo montras eĉ pli: la kvanto de interesiĝantoj pri iu aŭ alia lando rekte dependas de la kvanto de lernantoj, al kiuj oni instruas ties lingvon.

	Procento de respondintoj kiuj lernis devigite	fakultative	Lando, kiujn la respondintoj pleje deziras viziti
la anglan	82%	19%	1. ANGLIO, USONO
la francan	28%	3%	2. FRANCIO
la germanan	16%	1%	3. Italio, GERMANIO
la hispanan	2%	15%	4. HISPANIO, Grekio, Skandinavio, Nederlando

Konsiderante tiun ĉi aspekton de la enketrezultoj, oni povas antaŭvidi, ke la kreskanta hegemonio de la angla lingvo en la Eŭropaj lernejoj kaŝas en si pli kaj pli danĝeran limigon de interesiĝo pri landoj kaj popoloj ne angla-lingvaj.

Ĉar la kompilinto de tiu ĉi raporto ne kredas je la praktika eblo krei poliglotojn amase en lernejoj ŝi inklinas al la solvo de la interkomunikadaj problemoj pere de la enkonduko de unu nura pontlingvo, instruata ĉie al ĉiuj lernantoj. Unu nura internacia lingvo, kaj nepre neŭtrala! Tiun ĉi rimedon aprobis teorie 36% de la enketitoj. Estas bedaŭrinde, ke la plejmulto de ili ne scias, ke tia neŭtrala pontlingvo estas ĉe-mana realaĵo, eminente funkcianta, aparte ŝatata de junuloj, ĉar ĝia perfekta alproprigo daŭras nur eron de la tempo, kiun oni kutime dediĉas al la lernado de iu ajn fremda lingvo. Jes, temas pri la Internacia Lingvo Esperanto, kiu nepre meritas la atenton de ĉiuj, kiuj okupiĝas pri la instruado kaj la edukado de la juna generacio kaj pri la pli facila kunvivado de la multlingva loĝantaro de nia kontinento kaj de nia tuta planedo.

Kunlaboris en la enketo Renée Triolle, Fernand Boyet (F), Harald Schmitz (Germ.), Kovács Márta (H), Elisabetta Vilisics Formaggio (la aŭtorino-kunordiginto), Maria Ferrari (I), Llibert Puig Gandia (Kat.), Svetlana Pogorelaja (Ukr.)

Tradukoj bezonataj

La raporto sur la antaŭaj paĝoj atingos plenan utilon nur se ĝi estos tradukita en diversajn naciajn lingvojn; ĝi estis celita unuavice por ne-esperantista publiko. Kiu pretas traduki, aŭ scius utiligi ĝin iel, bv. kontaktu la verkinton.

Elisabetta V. Formaggio, Via Privata S. Rufino 32, I-16043 Chiavari, Italio.

UNESKO:

Edukado por la 21a jarcento

'Edukado antaŭ krizo de valoroj' estas la ĉeftitolo de raporto de Unesko, kies subtitolo pli trafe karakterizas ĝin: 'Strategioj por fortigi humanismajn, kulturajn kaj internaciajn valorojn en formala kaj ne-formala edukado'. La 35-paĝa raporto aperis angle kaj france kaj resumas altnivelan labor-konferencon en Budapeŝto fine de 1991 (pri kiu ILEI bedaŭrinde nur poste eksciis). Ni ricevis ĉi tiun raporton pro nia reago al alvoko de Unesko partopreni en laborgrupo 'Edukado por la 21a jarcento'. La enhavo estas grupigita jene:

1. Kultura identeco kaj diverseco en la eduka kampo
2. Humanismaj, estetikaj kaj etikaj valoroj
3. Edukado antaŭ etikaj problemoj starigitaj de scienca kaj teknologia progreso.

La unua eble plej rekte koncernas nin kaj bazis sin sur la sekvaj tendencoj:

1. La serĉo por Eŭropa identeco kaj unuiĝo.
2. La kontraŭo, rimarkata per releviĝo de naciemaj movadoj spegulante etnajn kaj religiajn grupiĝojn
3. Fluoj de enmigrantoj al okcidenta Eŭropo el oriento kaj sudo.

Sekve necesas pli klare kompreni la faktorojn, kiuj difinas kulturan identecon kaj la rezultajn kondut-ŝablonojn; la ecojn de interkultura komunikado, la fonto de rigidaj kulturaj sintenoj kaj malakcepto de fremdaj kulturoj, kaj la procezo de socia ekskludado.

Lernantoj devas akiri pli klaran komprenon de konceptoj kiaj: demokratio, homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj; toleremo kaj pluralismo, memstareco kaj kunlaboremo, konflikto kaj ŝanĝo. Pliaj eksperimentoj pri interkultura edukado necesas. Ili devus enplekti infanojn, indiĝenajn kaj enmigrintajn, konstrui ponton inter scio kaj edukado, sekve esplori pli ol nur la lingva problemo; kontentigi kaj individuajn kaj grupajn bezonojn, integri infanojn ne nur en la lernejo sed ankaŭ en la komunumo; havi interdisciplinan karakteron, rekoni la multajn diversajn funkciojn de lingvo kaj kuraĝigi stud-temaran reformon; precipe pri historio, geografio, literaturo kaj edukado pri civitana kaj socia vivo.

resumis smg.


Juna amiko

La sola revuo pli aĝa ol sia legantaro!

Dum dudek jaroj ĝi servadas la lernejanojn kaj instruistojn. Ekde la nova jaro, ĉiu numero havos 32 paĝojn. En ĉiu numero ni povos prezenti kvizon, kruc-enigmon, tabul-ludon, teatraĵeton, rakontojn, korespondamikojn, kantojn, digesteblajn gramatikajn klarigojn, rol-ludojn ktp. ktp. Ĉio en simpla kaj taŭga lingvaĵo, alloge ilustrata de Pavel Rak kaj Esperantina Mirska. Gi aboneblas ĉe ILEI (50 SEK) aŭ tra la abonservo de UEA (16 NLG por kvar numeroj), aŭ ĉe via enlanda peranto en via nacia valuto. Grandaj rabatoj, ĝis 50% por kvantaj mendoj. Mendu nun!

INTENSIVA KURSO POR INSTRUISTOJ

Kultura Centro Esperantista,
9 – 17 julio, 1993



Gvidos: Prof. D-ro Duncan Charters,
Fako de fremdlingva instruado,
Principia College, Usono

La kurso celas doni al novaj kaj al jam spertaj instruistoj de Esperanto teorian kaj praktikan bazon por pliefikigi la instrukapablon. La enhavo de la kurso baziĝos ĉefe sur la disvolvado de la jenaj temoj, pere de prezentaĵoj de la instruisto kaj aktiva, praktika ekzercado de la kursanoj.

1. Kio necesas por fariĝi sukcesa instruisto de Esperanto? Scioj kaj kapabloj bezonataj por kompetenteco, kaj por efektivigo de ĉiam pli efika instruado kaj lernado.

2. Nuntempaj lernoteorioj kaj la instruado de Esperanto. La rolo de la lernantoj, la instruisto, la materialoj. Motivigo de la lernantoj: kiel ili konvinkiĝas pri la valoro de la klaso kaj kiel la instruisto identigu kaj forigu barilojn al la lernado. La simileco de la instruado de Esperanto al la instruado de aliaj negepatraj lingvoj, kaj ĝia unikeco.

3. La rolo de la pedagogia lingvistiko en la instruado de fonetiko kaj aparte gramatiko. Klasikaj kaj modernaj teorioj pri gramatiko kaj ĝia instruado: kiel ebligi al la lernanto kompreni kaj praktike sekvi la norman, intuician uzon de la bona parolanto. Kiel aliri specifajn problemojn (ekz. -ig-/ iĝ-, -n, -u) kaj kiel la lernantoj plej efike alproprigu strukturojn kiuj malsimilas tiujn de la gepatra lingvo aŭ de aliaj konataj lingvoj. La konstanta influo de la gepatra aŭ aliaj lingvoj: kiel ĝin utiligi kaj samtempe minimumigi.

4. La instruado de la aŭskultokompreno. Teorioj kaj praktikoj usonaj kaj alilandaj, ekz. Asher (TPR), Krashen, Terrell ("Natura"), Gattegno ("Silenta"): de la tradicia neglektado de instruado de aŭskultokompreno al hipotezoj ke ĝi bazas la aŭtentikan lingvoalproprigon. Kiel oni prezentu lingvomaterialon en la klasĉambro; kiel krei efikajn komprenekzercojn.

5. La instruado de la parolkapablo. De rekta metodo al rapidripetaj parkere lernitaj dialogoj kaj strukturaj ekzercoj, kaj de tiaj "parolaŭskultaj" metodoj al natura komunikado. Kreema kontraŭ-ŝablona lernado kaj instruado, takso kaj progresigo de la elementoj de parol-kompetento, lernantoj-instruistoj, ler-

nokomunumoj, situaci-komunika instruado, rolludado kaj dramtekniko, plej diversaj ekzemploj de efika paroligo de la lernantoj.

6. La instruado de la legokapablo kaj skribkapablo. De deĉifrado al komprenema legado, de diktado al verkado. Kiel kunplekti ĉiujn lingvokapablojn por subteni unu la aliajn.

7. Kiel instrui la kulturon kaj literaturon de Esperanto. Kial gravas al la individuo legi literaturon? Kiel elekti literaturaĵojn je la taŭga nivelo. Kion povas fari la legado de literaturo por la lernanto de Esperanto kaj por la movado? Kiel instrui pri la Esperanto-movado, ĝiaj idealoj kaj praktikaj servoj.

8. Kiel ekzameni la sciojn kaj kapablojn de la lernantoj, kiel uzi ekzamenojn pozitive, kiel konformigi ilin precize al tio kion oni efektive instruis (aŭ ebligis al la lernantoj alproprigi), kiel taksi ilian efikecon kaj plibonigi ilin.

9. La teknologio en la lingvolernado. Kion povas kontribui sonbendoj (parola lingvo kaj muziko), video, kaj komputiloj en diversaj kombinaĵoj: perspektivoj por la estonteco.

10. Kiel adapti lernolibron kaj materialojn al plej efika lernado kaj instruado; kiel krei materialojn por adaptiĝo al individuaj klasoj kaj cirkonstancoj.

11. Elekto de la plej utilaj elementoj por forĝi la plej efikan individuan vojon al la instruado de Esperanto. Kiel realecigi, nutri kaj plenumi la esperojn de la kursanoj, kiel taksi la efikecon de la propra instruado kaj instruprogramo, kiel progresi en sia instrukapablo eĉ sen kompetenta profesia helpo aŭ konsilado.

Adreso de KCE: Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; tel. (039) 26 74 07. Pĉk. 23-2921-8.
Adreso de E-Centro Poprad, Sobotske nam. 6, ??-058 01 Poprad, Slovakio; tel. (092) 324 19.

STIPENDIOJ PREPARATAJ POR ĈI TIU KURSO

ILEI en kunlaboro kun UEA kaj KCE proponos tri stipendiojn, kiuj kovros 80% de la partoprenkostoj de ĉi tiu grava kurso. Kondiĉo estas, ke la stipendiulo jam nun instruas Esperanton en lernejo aŭ havos realan eblecon fari tion tuj post la kurso. La stipendio estas por instruistoj en landoj kun malfavoraj ekonomiaj kondiĉoj. Dezirantoj povas kandidatiĝi por stipendio per la sekvanta mendilo, aldonante skriban raporton pri siaj instrua agado, Esperanta kaj ĝenerala kaj la surlokaj kondiĉoj kaj eblecoj. Tiujn petojn ni devos ricevi ĝis la fino de marto 1993.

Aliĝilo por instruistaj kursoj en 1993

Resendu al: ILEI, Esö u 7 [III], H-1034 Budapest, Hungario.

Nomo: . . . . . .

Adreso: . . . . . .
Sekso: ..... Profesio: ..... Naskiĝdato: .....

Mi aliĝas al la sekva(j) kurso(j):
___ Majo 27-30 Poprad. ___ Julio 9-17 KCE ___ Oktobro 14-17 Poprad

Mi pagos al: ___ UEA (konto ilek-a); ___ B. Andreasson; ____ KCE (reform-eŭropanoj nur): ___ Hungara ILEI-Sekcio, ____ E-Centro Poprad

Subskribo . . . . . Dato: . . . . .

La maja kurso en Poprad kostos 55 NLG (165SEK) aŭ 1950 HUF aŭ 700 CSK por reform-eŭropanoj, por plurlita dormĉambro en la centro, kaj 70 NLG, 210SEK, 2200 HUF aŭ 800 CSK por dulita apartamento en apuda domo. La kotizo inkluzivas tri tranoktojn kaj tri manĝojn tage kaj la kursokoston. Por la oktobra kurso povus okazi iometa kost-altiĝo. Membroj de SEA kaj ĈEA ĝuas rabaton de 30% en E-Centro Poprad.

En KCE du-semajna restado kun la kurso-kosto sumiĝos je ĉ. 330 CHF (ĉ. 370 NLG, 1110 SEK), (9500 HUF, 3400 CSK por reform-eŭropanoj), sed ni komunikos al aliĝantoj la precizan koston kaj pagmanierojn, tuj kiam sciate.

PETILO POR SUBVENCIO DE 80% DE LA KURSO-KOSTOJ

Bonvolu listigi sur aparta paperpeco la sekvajn informojn, kaj ajnajn aliajn, kiuj povas rilati al la peto. Bonvolu tajpi aŭ skribi tre klare la tuton!

Tipo de instruista diplomo posedata: . . . . . .
Daŭro, jaroj, tipo kaj loko de instruista trejnado: . . . . . .
Nuntempa instruista laboro (ĉu oficiala, ĉu plentempa, ĉu neoficiala sed en lernejo, al kiomaĝaj lernantoj) . . . . . .
Studobjektoj instruataj . . . . . .
Nuna E-instruado: daŭro, ofteco, loko, kiom oficiala, aĝo de lernantoj, instruiloj kaj metodoj uzataj. . . . . .

Mi atestas, ke post eventuala partopreno en intensiva kurso de ILEI, mi havos intencon kaj eblecon instrui Esperanton. Mi aldonas sur aparta folio detalojn pri tiuj eblecoj kaj planoj. Mi aldonas klarigon, kial mi persone aŭ mia ILEI-sekcio trovus malfacile kovri tiujn kurso-kostojn.

Subskribo de la kandidato: . . . . . .

Apoga subskribo de la ILEI-sekcio (se ekzistas) . . . . . .

Loko: ..... Dato: .....

Atentu: Limdato por ricevo de la subvencipetoj: 31 marto 1993.

Lernolibroj sub lupeo

Antaŭ unu jaro Eldonejo Esperanto en Oslo dissendis cirkuleron al dek personoj, kiuj aĉetis la novan lernolibron *Tra la mondo* de Falck kaj Rosbach, personoj, pri kiuj oni supozis, ke ili uzas la libron por instrui Esperanton. Oni esperis ricevi raportojn pri spertoj, rimarkigojn, kritikojn, proponojn pri ŝanĝoj. Kvar el la dek personoj respondis. Efektive en neniu el la ricevitaj raportoj enestas vera kritiko, sed jes kelkaj rimarkigoj kaj du-tri proponoj. Leginte antaŭ duona jaro la raportojn mi decidis skribi pri lernolibroj ĝenerale, ĉiam kun flankrigardo al la aktuala libro. Mian artikolon mi sendas duloken: al *Norvega Esperantisto*, ĉar ja temas pri norvega lernolibro kaj al *Internacia Pedagogia Revuo*, pro evidenta kaŭzo.

Aspekto

Unu el la menciitaj respondintoj dezirus pli belan eksteran aspekton de la lernolibro. Sciante, ke temas pri provizora eldono, ankaŭ mi tamen same reagis, kiam mi vidis la unuan fojon la libron. Tio aktualigas la demandon: ĉu aspekto de lernolibro estas grava? Mi supozas, ke la plej multaj, kiel mi, iom baŭmetas antaŭ tiom griza kovrilo – kaj tiel granda formato. Sed la fervoro kaj la lernemo pardonas kaj oni volonte malfermas la libron. Kompreneble ĉiu lernolibro devus esti apetitiga. Ni memoras el niaj lernejaj jaroj, ke ni ne ĉiam amegis niajn lernilojn. Sed tio, la aspekto, estas afero de mono. Ne ĉiu lernolibro povas aspekti kiel la du usonaj libroj pri la hispana lingvo *Nuestros amigos* (Niaj amikoj) kaj *El mundo de la juventud* (La mondo de la junularo), eldonitaj de Harcourt Brace Iovanovich. Tiuj libroj estas tiom apetitigaj, ke oni dezirus lerni la hispanan nur por havi la eblecon teni ilin inter la manoj: abundego da bildoj, buntaj koloroj, klaraj tabeloj, plaĉa tipografio. Profesia instruisto efektive estas vere feliĉa tenante tiujn presaĵojn enmane. Tia estas mia revo: se la esperantaj instruiloj aspektus tiel, ni sendube entuziasmigus milojn da junuloj. Sed ni scias ĉiuj, kial niaj lernolibroj estas iom pli modestaj.

Glosoj

Ĝenerala deziro estas, ke ĉiu ĉapitro donu la vortojn, kiujn enkondukis la ĉapitro, ĉar serĉado, ĉiam ĉe fina listo, estas malplaĉa kaj enuiga. Mi ne povas pli samopinii. La bonega rusa lernolibro *Russkij jazik dlja vsjeh* (La rusa lingvo por ĉiuj), eldonita de Izdatielstvo Russkij Jazik en Moskvo, havas nur tian liston ĉe la fino de la libro plus – cetere – apartan kajeron kun vortaro. Nu, ĉiuj novaj vortoj aperas ankaŭ ĉe la unua apero ĉe la piedo de la paĝo – sed sen traduko. Se oni ne senpere komprenas la novan vorton, la paĝpieda prezento de la vorto ne estas sufiĉa.

Privilegia Vojo al Lingvoscio de Vilho Setälä prezentas la novajn vortojn marĝene, apud la tekstoj (sed ja ne kun traduko, nur kun esperantlingva klarigo, kiu, cetere estas ĉiam trafa kaj sufiĉa!). Oni povas diskuti, kio estas pre-

Deka Internacia Metodika Seminario (IMS)

(aŭspiciata de ILEI)

Loko: Zagrebo, Hotelo PARK (B-kategoria)
Ivanicgradska bb, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Organiza adreso: Kroatia Esperanto-Unio, p/a Marija Belosevic, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb; tel. (+ + 38 41) 576092.

Datoj: La 3a ĝis la 8a de aprilo 1993.
Unua manĝo: sabate, vespermanĝo. Lasta manĝo: ĵaŭde, tagmanĝo.

La hotelo disponigas unu grandan kaj unu malgrandan kunven-salonon. En distanco de du minutoj estas kultura centro, kiu disponigos pliajn salonojn, komputilon, faksilon kaj spacon por ekspozicio. En la najbareco de la hotelo troviĝas granda magazeno kaj poŝtoficejo. La hotelon oni atingas de la ĉefa stacidomo kaj bus-stacio per tramoj 2 kaj 3. Veturtempo ĉ.12 minuta.

La kotizo inkluzivas kvin plenajn pensionojn (tranoktadoj + tri manĝoj), aliĝon al la tuta programo kaj unu ekskurson:

Orientanoj:	200 DEM ĝis la 1a de marto 1993	(230 DM poste).
	9000 HUF	(10500 HUF)
Okcidentanoj:	260 DEM ĝis la 1a de marto 1993	(290 DEM poste.)

ILEI akceptos en Budapeŝto kotizojn en Hungaraj forintoj de orientanoj, ĉe la adreso de la ILEI-sekcio. Aliĝojn oni akceptos forinte dum la Naciaj Hungaraj Pedagogiaj Tagoj en Budapesto (26-28 feb 93).

Kroatoj rajtos pagi la kotizon dinare, laŭ la kategorio "orientanoj". Nur por urbanoj oni ofertas partoprenon sen loĝado, ĉar unu tranokto por eksterlandano en komparebla hotelo jam kostas pli ol cent markoj. Nur aliĝintoj rajtas partopreni.

Pagu en germanaj markoj al la valuta konto de Kroatia Esperantista Unuiĝo (Hrvatski esperantski savez, Trg. Burze 2, HR-41000 Zagreb) ĉe Zagrebacka Banka, Savska 60, HR-41000 Zagreb S.W.I.F.T. Telekso: 21211 zaba. Konto: 25731 3807975.

Pagojn akceptas KEU ankaŭ en sia konto ĉe UEA: kreu-g.

Bv. sendi kopion de via enpagilo, kune kun via aliĝilo.

KEU preparas pli detalan informilon, kiun ricevos ĉiu aliĝinto; ĝi servos ankaŭ kiel konfirmilo.

Malmultaj nacianoj bezonas vizon por eniri Kroation, sed se tio necesas, vi devos unue aliĝi, pagi kaj ricevi tiun konfirmilon por povi ricevi la vizon.

PROGRAMO:

Kontribu-proponojn por la programo sendu al ILEI, S-ino Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario; tel. (+ +36 1)201-2342. Prezentaĵoj daŭru prefere ne pli ol 30 minutojn. Vidu la sekvan paĝon.

EKSPOZICIO:

Dum IMS oni organizos ekspozicion de lernolibroj kaj instru-helpiloj. Kontribuaĵojn al tio bv. sendi al KEU ĝis la 15a de marto 1993.

CSEH-SEMINARIO:

La Internacia Esperanto-Instituto en Hago organizos Cseh-seminarion paralele kun IMS. Partopreno: 230 DEM por orientanoj kaj 290 DEM por okcidentanoj. Tio inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj la kursmaterialon. Okazos ankaŭ baza kaj meza seminarioj por instruistoj.

EKZAMEN-SESIO

KEU organizos ekzamen-sesion de la elementaj kaj mezaj lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI en la 5a kaj 6a de aprilo. Pageblaj surloke (60% de MA kotizo de UEA por via loĝlando).

INTERNACIA RENKONTIĜO POR GELERNANTOJ

Prezo: 200 DEM por plena pensiono en la hotelo; 100 DEM por loĝigo en la hejmo de enurbaj lernantoj kaj manĝoj en la hotelo. La programo inkluzivos teatran prezenton de lokaj lernantoj kaj viziton al dolĉaĵ-fabriko.

ATINGI ZAGREBON

Trajne: rektaj trajnoj estas el: Budapeŝto (tri tage), Vieno (du, unu IC), Parizo, Milano, (Romo)-Venecio (EC), Munkeno (Zuriko) (EC).

Buse: rektaj busoj el Triesto, Nagykanizsa, Barcs, Graz, Vieno kaj pluraj urboj en Germanio.

Aviadile: Rekte el pluraj eŭropaj urboj.

Estas konsilinde esplori ĉe vojaĝ-agentejoj, ĉar en tiu antaŭpaska periodo estos ekstraj trafikiloj, ofte kun avantaĝaj prezofertoj.

Se vi sciigos vian alven-horon, la organizantoj provos renkonti vin. Ili deĵoros stacidome ktp. komence de la aranĝo.

SEKURECO

De post la komenco de 1992, dum la lastaj 14 monatoj, ne estis alarmoj aŭ atakoj en Zagrebo kaj de tiam la vivo normaliĝis. Ĉiuj institucioj, fabrikoj kaj lernejoj funkcias senprobleme. Zagrebo apartenas al la parto de Kroatio kiu estas la plej sekura (la nordo kaj Istrio). Nun la rifuĝinta situacio stabiliĝis. Dum la lasta jaro Zagrebo gastigis plurajn mondajn okazaĵojn (foirojn, simpoziojn ks.) kaj akceptis centon da eksterlandaj delegacioj senprobleme.

Temoj de la IMS:

1) Spertoj pri intensaj lingvo-kursoj
2) Pedagogia terminologio

Dum la IMS en Litovio montriĝis granda intereso pri *intensaj lingvokursoj* por junuloj kaj plenaĝuloj, pro tio ni deziras elvolvi tiun ĉi temon en la venonta IMS en Zagrebo.

Pli kaj pli disvastiĝas t.n. celkursoj, kiuj ne volas – eĉ ne povas! – havigi kompletan lingvoscion (kompetenton kaj performancon), sed elektas iun celon, ekz. klarigi la fundamentan gramatikon, aŭ kompari la strukturon de Eo kun alia(j) lingvo(j), aŭ kapabligi legi fakliteraturon, aŭ doni ŝlosilon al ĉiutaga aŭ speciala konversacio, instruante sintagmojn, pretajn parolelementojn ktp. ktp. Tiaj kursoj preparas la kursanojn je diversaj situacioj (ekz-e fariĝi helpanto en UK k.s.), aŭ je celekzamenoj.

La intensaj kursoj estas ege variaj, diversspecaj kaj ili bezonas iom specialajn studmaterialojn, metodojn kaj rimedojn, sed ankaŭ psikologian aliron.

Montriĝas bezono, pro tio ankaŭ intereso, ke ni interŝanĝu spertojn tiurilate: ni analizu la motivojn, kolektu materialojn, ideojn, prezentu la praktikajn manierojn kaj severe, reale tasku la atingeblajn rezultojn de la kursoj.

La neceso de *faka terminologio* ne bezonas apartan argumentadon: por interkompreniĝi inter samfakuloj ne sufiĉas paroli la saman lingvon, sed necesas paroli en la sama faka lingvo. Gravas, ke ni havu normigitan fakan terminaron pri pedagogio, didaktiko, metodiko, alie ni ne povas scii, kiu kion komprenas sub *instrumetodo, -maniero, -procezo, -vojo, -rimedo, -teĥniko* k.s., aŭ *metodiko, metodologio, lingvo-pedagogio, glotodidaktiko* ktp. Diversaj verkistoj (Rakusa, Szerdahelyi, Szanser k.s.) atribuas ne la saman signifon al la samaj vortoj. Sporade jam ekzistas klopodoj por la normigo, sed venis la tempo ke decidu la kolektiva prudento.

Do, koran kolegan inviton al la deka IMS!

BARCSAY Zsuzsa
1993 01 15

Donacoj al **Fondaĵo Szerdahelyi** por subteni nian agadon:
Raita Pyhälä, Finnlando 100 SEK
Ronald J. Glossop, Usono 100 NLG
Al ambaŭ tre koran dankon!

ALIĜILO AL LA DEKA IMS

Sendu al KEU, Marija Belosevic, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Nomo: .....

Adreso: .....

Sekso: ..... Profesio: .....

Mi volas partopreni: ___ IMS ___ La Cseh-seminarion
___ La Lernejanan renkontiĝon ____ Ekzamenon: elementan/mezan.

Mi alvenos je: .....

Mi deziras dividi ĉambron kun: .....

Mi havas apartan dietan peton, nome: .....

Mi pagis la kotizon al: .....

kaj aldonas pruvilon por la pago.

Subskribo: ..... Loko: ..... Dato: .....

La postlastmomenta alveno de informoj pri la IMS (pro faksiloj konektitaj al nigraj truoj) igis nin tamen prepari ĉi tiun informilon/aliĝilon kaj sendi ĝin eksprese aere al Belgio por aldono en la numero. Ni kaptas la okazon aldoni aliajn informojn:

FAKA KUNVENO EN HUNGARIO INVITAS

Ellasita el la kalendaro: Pedagogiaj Tagoj de la hungara ILEI-sekcio. Budapeŝto, en Faka Mezlernejo Egressy, Egressy u. 71, Budapeŝto XIV, 27-28 Feb 1993 (sabate kaj dimanĉe). Eksterlandanoj bonvenaj, loĝigo aranĝebla modestpreze en apuda studenthejmo (320 HUF nokte). Anoncu vin ĉe la Hungara sekcio.

SERĈATAJ!

- Helpantoj kaj instruistoj por la venonta Gimnazio de ILEI.
- Gvidantoj por la kvar konversaciaj rondoj en la venonta UK.
- Sekretario por la starigata supera nivelo de la UEA/ILEI ekzamenoj.

Kiu opinias sin fake kvalifikita kaj emas je unu aŭ pli el tiuj taskoj, bv. anonci sin al s-ino Barcsay aŭ la prezidanto kun konciza skriba sinprezento. Laŭpete ni detaligos la enhavon de tiuj taskoj kaj la modestecon de la rekompenso!

ferinda, tia apudado de glosoj aŭ listeto sub la teksto – aŭ eĉ kun prezento de la uzotaj novaj vortoj super la teksto. Mi scias, ke tre multaj pedagogoj tre kontraŭas tiun lastan eblecon, dezirante, ke plejeble multaj novaj vortoj estu komprenataj per kaj pro sia uziĝo en la kunteksto.

Kvara metodo estas tiu uzita de Frits Linden en *Esperantokurs* eldonita de Esperantoskolan, Stockholm. Linden metas ciferojn ĉe ĉiu nova vorto kaj sendas al la koresponda cifero ĉe la piedo de la paĝo, tiel ke la instrua teksto ofte flosas sur solida fundamento de glosoj. Mallonga citaĵo certe sufiĉe demonstras, kial almenaŭ mi avertas kontraŭ tia glosklarigo: la ciferoj en la teksto estas tre ĝenaj. Jen: "Li metas la [20] trunkojn kaj [21] trabojn sur [22] blokojn kaj [23] ebenigas aŭ [24] platigas ilin per [24] hakilo aŭ [25] rekte uzas [26] diktabulojn. La [27] splitoj estos bona [28] hejtaĵo. Por [29] masoni [30] necesas [31] trulo, [32] mortero, [33] martelo kaj [34] stablo por la masonisto". Ĉu sufiĉe?

Cetere la libro estas bonega, kun multaj desegnaĵoj. Tamen mi aldonu, ke en ĵus prezentita tekstero la vorto *rekte* portas la nombron 217, kiu sendas al klarigo (tri paĝojn poste) pri la diferenco inter *rekte* kaj *direkte*.

La libro pri Esperanto en la prestiĝoriĉa serio *Teach Yourself* (Instruu al vi mem), eldonita de The English Universities Press Ltd, aranĝas la novajn vortojn alfabete kaj enŝovas ilin tutpaĝe, post la gramatika parto kaj la ekzercoj.

Prezento

La plej simpla, plej primitiva kaj eble plej postulema formo de tekstprezentado estas senkomenta amasigo de frazoj, kiuj neniel rilatas unu al la aliaj, sen glosoj kaj sen gramatikaĵoj. Guste tia estis la elementa lernolibro pri la latina lingvo, dum jardekoj, eble dum jarcento, uzita en norvegaj gimnazioj: 'Agricola arat – Populus alta' (La kamparano plugas – Alta popolo). Certe, la 'ĉapitroj' estas aranĝitaj laŭ gramatika progresado, kiun oni devis mem eltrovi – se oni ne estis en lerneja situacio kun sperta instruisto – kaj signifon de la vortoj oni devis ĉiukaze mem serĉi en la dika leksikono. La elstara dana lingvisto profesoro Kristoffer Nyrop (1858-1931), aŭtoro de i.a. la sesvoluma *Grammaire historique de la langue française* (Historia gramatiko de la franca lingvo), eldonis tre solidajn lernolibrojn pri la itala kaj la hispana lingvoj, por – kiel li mem diras – meminstruado kaj lerneja instruado. En grandaj partoj de tiuj libroj li apudigis danajn kaj alilingvajn frazojn, tiel evitante la uzon de glosaro: oni senpere komprenas la vortojn el la paralelaj ekzemploj. 'Il palazzo e bello e grande. Slottet er smukt og stort. Un piccolo giardino. En lille Have.' Ĉe tiu lasta frazo aperas malgranda cifero 1, kiu sendas al la piedo de la paĝo, kie oni informas, ke *giardino* precipe signifas florĝardeno, dum fruktĝardeno aŭ legoma ĝardeno estas *orto*. Tiamaniere profesoro Nyrop prezentas sciojn proksimajn al la temo – tra la tuta libro. Kelkloke aperas pli longaj tekstoj sen dana apudaĵo, kaj tie Nyrop uzas la saman sistemon kiel Linden por informi pri la signifo de la nekonataj vortoj. Tiuj lernolibroj de Nyrop kompreneble estas tre

malmodernaj nun, cetere mi siatempe lernis germanan lingvon per simila lernolibro. Tiu germana same kiel la itala kaj la hispana de Nyrop kompreneble estis sen ilustraĵoj kaj sen io ajn, kiu povus sproni la lernemon per ia delikataĵo, humoraĵo, io ne komplete serioza. Tamen oni lernis ankaŭ per tiaj libroj!


La libro de la anglaj universitatoj preskaŭ ne havas tekstojn, nur gramatikajn ekzemplojn. Frits Linden havis pritemajn artikolojn. Setälä rakontas pri la aventuroj de du etaj kokoj, Keko kaj Riko, kies nomojn li verŝajne derivis de la kokeriko de la koko. Tiel Setälä enkondukis en sian libron firman unuecon, fadenon, kiun oni povas sekvi, konsekvencon laŭ la dua difino en PIV: 'logika aŭ racia interligiteco inter faktoj kaj ideoj'.

La menciita rusa lernolibro same rakontas pri familio kaj ties konatoj kaj najbaroj dum ekz. profesoro L. von Marnitz en *Russisches Elementarbuch* donas legaĵojn koneksajn, same kiel profesoro Olaf Broch en sia norvega *Laerebok i russisk*. Mi povas certigi, ke la rusa libro estas multe pli invita ol la du aliaj, kiuj, cetere, ne estas ilustritaj.

Tra la mondo de Falck kaj Rosbach adoptis tiujn vojojn. La libro prezentas la travivaĵojn de unu familio kaj tiujn de du junuloj vojaĝantaj en Eŭropo. Tio ebligas la peradon de multaj scioj pri arto kaj kulturo, kiel lektoro Odd Tangerud substrekis en sia tre favora recenzo en *Skoleforum*, la organo de la instruistoj en la norvegaj liceoj.

La studmaterialo

Kion instrui? Kiel instrui? Ĉu oni devas eviti malfacilajn vortojn? Kiaj vortoj estas malfacilaj? Jen problemoj por ĉiu verkisto de lernolibro. La problemo estas des pli malfacila, ĉar ĝi estas kompleksa. La lingvoj estas diversaj, tial oni devas (aŭ almenaŭ povas aŭ provas) ataki la vortarajn, prononcajn kaj gramatikajn flankojn de la diversaj lingvoj laŭ la strukturo de la lingvoj. Se Kristoffer Nyrop komence de sia hispana lernolibro konstatas, ke 'el azucar es dulce' (la sukero estas dolĉa), tio ne estas, ĉar li pensas, ke sukero kaj dolĉa estas vortoj nepre tuj konendaj, sed la frazo spegulas la fakton, ke la hispana lingvo havas du verbojn, *ser* kaj *esta*, kiuj signifas *esti*, sed kies uzo estas diversa. Same la frazo *kto eta?* (kiu tio?), la unuaj vortoj en la jam laŭdita rusa 'uĉebnik' (lernolibro) spegulas la fakton, ke la rusa efektive ne havas la vorton *esti* en prezenco en similaj frazoj. *Esti* uziĝas en frazoj kiel 'jestj li u vas papirosi?' (estas ĉu ĉe vi cigaredoj – do: ĉu vi havas cigaredojn). La supraj ekzemploj montru, ke Esperanto, kiu ne havas tiajn problemojn, estas multe pli libera kiam temas pri enkonduko de novaj vortoj kaj gramatikeroj. Do: ĉu oni en la komenco evitu malfacilajn vortojn? Kiuj vortoj kaj kiaj vortoj estas malfacilaj? Ĉu *hipopotamo* estas pli malfacila ol *krokodilo?* Se jes, kial? Apenaŭ pro la sonoj, kiuj konsistigas la vortojn? Ĉu pro tio, ke *hipopotamo* enhavas unu silabon pli ol *krokodilo*? Se jes, ĉu oni devas kalkuli la silabojn de ĉiuj vortoj en la komenco de elementa lernolibro? Aŭ ĉu *hipopotamo* estas malfacila pro tio, ke ĝi ne similas al norvega *flodhest*, [nek nederlanda *nijlpaard* (nila ĉevalo), nek hungara *viziló* (akvo-ĉevalo) ktp. –red.] dum *krokodilo* estas preskaŭ identa kun la norvega *krokodille*? Ĉu, do hipopotamoj ne aperu en norvega lernolibro, dum ĝi ja ne ekziliĝu el francaj kaj anglaj lernolibroj? Unu el la demanditoj en la enketo de la Eldonejo trovas, ke ĝuste *hipopotamo* estas malfacila vorto, kaj li eĉ konfesas ke li antaŭe ne konis la vorton. Ĉu ankaŭ tio estu kriterio pri la malfacileco de vorto? Mi divenus, ke tre multaj esperantistoj ne konas la vorton *umbiliko*. Ĉu ĝi tial estas malfacila? Ĉiu dujarulo konas la respondan vorton en sia nacia lingvo. [Kaj denaska dujara esperantisto samkiale scius ĝin esperante! –red]. En la norvega ĝi estas *navle*. Ĝi estas tre, tre elementa kaj necesa kaj aktuala vorto por la infanoj. Tio igas min demandi: ĉu vi iam trovis en lernolibro pri fremda lingvo la vorton, kiu signifas *umbiliko*?





Naturmetodo iam estis slogano de lingvoinstruistoj. La vorto verŝajne ne bezonas klarigon. Sed ĉu vere, ni instruu fremdlingvojn laŭ la sama principo – aŭ pli ĝuste: manko de principo – kiun ni uzas, kiam ni lernigas niajn etulojn? Tiam ni ja parolas pri ĉio ajn, neniam pensante eĉ momenton pri la gramatikaj problemoj! Ni studu iomete nian procedon!

La patrino priparolas sin mem kiel Panjon kaj la infanon kiel Jozefon. Bonege, ĉar la nocioj *mi* kaj *vi* estas malfacilaj pro tio, ke Panjo kaj Jozefo ambaŭ estas *vi* kaj *mi*, tio dependas de la starpunkto, de tio, kiu parolas. Tio jam estas problemo por cerbeto. Panjo levas Jozefon, portas lin al la fenestro, montras la birdojn sur la arbobranĉoj, klarigas, ke tio estas *pip-pip*. La infano ne aŭdas la pepadon, sed la patrino scias, ke la birdoj diras proksimume *pip-pip*. Ŝi asocias sian scion pri sono kun la vidbildo de la infano! Simile la hundo estas *vaŭvaŭ*, eĉ se la infano neniam aŭdis hundobojadon. Porko estas *noff-noff*. Iam, parolante kun Vilho Setälä pri la bestvoĉoj, mi demandis, kion diras la finnaj porkoj – la finna lingvo ja ne havas la sonon F! Setälä informis, ke la finnaj porkoj diras *roh-roh*!

Oni kredus, ke la gepatroj deziras, ke la infanoj parolu 'infane' dum plejeble longa periodo. Ĉu tial ili instruas al la infanoj, ke *mano* norveglingve estas *lanke*, dum ĝi fakte estas *hånd*? Ĉu la infanoj bezonas la neekzistantan vorton

lanke, ĉu *hånd* estas 'malfacila vorto'? Ĉiukaze la infanoj devas relerni. La gepatroj eĉ falsigas la prononcon: *Lale dutten* anstataŭ *Rare gutten* (stranga knabo). Nu, R estas malfacila sono, sed ĉu oni helpas la infanon, se oni retenas tiun sonon, anstataŭante ĝin per la parenca sono L, kiun la infano ja tamen uzus, ne kapablante prononci la ĝustan sonon? Mi nur demandas. La vortara mondo de la infano ampleksas strangan kolekton: umbiliko, piedfingro, necesejo, fekaĵo, nazo, pupo, lito, kuseno, lumo, nokto, rado, papero, ŝnuro, skatolo, lakto, kaĉo. Multajn el tiuj vortoj vi ne trovos en ordinara lernolibro pri fremda lingvo. Kiom el ili vi bezonus por la unua renkonto kun esperantistoj en somera kunestado?

Kiam la infano estas iom pli granda, ĝi havas bildlibron, prefere kun multaj bestoj: krokodilo, hipopotamo, leono, hundo, kato, ĉevalo, zebro, simio, alko, serpento. La bestoj estas tre interesaj por la infanoj. Ĉu vi bezonas tiujn vortojn en junulara kunestado de esperantistoj? Apenaŭ! Sed tio ne signifas, ke tiuj vortoj povas esti inter la unuaj, kiujn vi lernu. Mi tralegis la pli ol kvarcent paĝan lernolibron rusdevenan pri la rusa lingvo: mi ne trovis en ĝi la rusajn vortojn pri kato, hundo, ĉevalo, arbo sed jes fizikisto, salato, sekreto, fama, kanoto, apendicito.

Universitata lektoro Gunnar Host estis unu el la plej elstaraj lingvopedagogoj de Norvegujo, pri tio ne estas diferenco de opinioj. Li verkis bonegajn lernolibrojn pri la franca lingvo por la norvegaj liceoj. En la lasta eldono li komencis per granda kolora bildo pri la universo deklamante, ke la universo estas vasta. Tio komprenebe estas tre logika punkto, sed oni rajtas – kiel faris unu el la demanditoj en la enketo de la Eldonejo en Oslo – trovi, ke tiu elirpunkto, kiom ajn logika, estas maltrafa, pro tio, ke oni prefere eliru de la plej proksima punkto. Tiu kritiko ja trafas la lernolibron *Tra la mondo*.

Elirante el la plej proksima ĉirkaŭaĵo, lernolibro-aŭtoroj antaŭ kvardeko da jaroj eltrovis, ke la lerneja situacio, la klasĉambraj objektoj 'kompreneble' estas la plej interesa medio por junuloj lernantaj fremdajn lingvojn. Sekve oni komencis la unuan lecionon en la klasejo, kaj la bedaŭrindaj gelernantoj devis lerni, kiel oni diras france kaj germane (miaj instrulingvoj): kreto, tabulo, krajono, spongo, liniilo, pupitro, katedro. Mi demandas min – kaj vin – ĉu tiuj estas vortoj aktualaj en la unua renkonto kun eksterlandano!

Mi respondecis pri tio, ke miaj lernantoj konu la samajn vortojn kiel la lernantoj de miaj kolegoj. Sed mi supozis, ke fremda medio estas pli altira ol la propra, ne ĉiam tre amata, klasejo. Mi petis la rajton instrui sen lernolibro, kaj mia ĉefo, rektoro Georg Klem, treege lerta lingvopedagogo, kun fervora intereso observadis mian eksperimenton. Mi simple aplikis la lernendajn vortojn en pli strečа medio. Mi fabrikis strečan historion pri oficejo de privata detektivo, kie ja troviĝas la ordinaraj krajonoj ktp. Krom la vortoj lernotaj el la lernolibro de la aliaj klasoj (kiun mi ja devis konstante konsulti) miaj gelernantoj lernis ankaŭ multajn aliajn vortojn, kiujn fajrigis la fantazion kaj entuziasmigis

la lernemon ĝis nekredebla grado, kaj mi ankoraŭ – kvardek jarojn poste – renkontas lernintojn, kiuj memoras la detektivajn lecionojn kaj ties etoson. Mi tion prezentas nur kiel objektivan informon pri miaj pensoj pri tio, kion mi nomas 'la medio de la instrumaterialo'.

Al tiu medio apartenas ankaŭ la bestoj. La infaneto interesiĝas pri bestoj. Zoologiaj ĝardenoj altiras grandan publikon. Unu el la demanditoj en la enketo de la Eldonejo trovas, ke *Tra la mondo* enhavas tro multe da materialo pri bestoj, kaj volus forstreki ĉion, kio koncernas bestojn. Tio estas la sola vere surpriza reago inter la demanditoj. Mi ĉiam – dum pli ol kvardekjara lerneja lingvoinstruado – spertis kreskantan intereson, kiam la temo tuŝis la bestojn, kaj mi tial kutimis strekdesegni tutan zoologian ĝardenon sur la nigra tabulo, kaj ĉiam la lernantoj, senescepte, lernis ĉiujn novajn vortojn por la nova leciono, eĉ *hipopotamo* kaj *rinocero* (kiu verŝajne ankaŭ estas 'malfacila' vorto pro tio, ke ĝi ne nomiĝas *nazkorno*, kiel en la norvega). Sed ili devis koni ankaŭ la alkon kaj la boacon, gravajn bestojn en la norvega faŭno. Ordinare la infanoj konas la paseron, la motacilon, la hirundon, la sturnon, la kolombon, la aglon, la kornikon kaj la pigon – ĉiuj aliaj birdoj estas nur "birdoj". Same devas esti en Esperanto. Tio samas pri arboj: kiu norvega esp-isto scias kio estas *sorpo*?

Mi menciis la francan lernolibron de Gunnar Host. En unu el la unuaj ĉapitroj li prezentas du paĝojn da bestoj, kun mallongaj frazoj: 'L'aigle est majesteux. Le tigre est féroce. (La aglo estas majesta. La tigro estas feroca, t.e. kruelega, laŭ PIV). Ĉu ne *majesta* kaj *feroca* estas 'malfacilaj vortoj', kaj ĉu ne tute nebezonataj en amika renkontiĝo dum Esperanta UK? Tamen, mi kuraĝas aserti, ke niaj lernantoj kun fiero prononcis ĝuste tiujn frazojn, trovante, ke ili estas elegantaj, kaj ke ili alportas ian fieron: 'mi scias iom pli ol la ordinarajn vortojn, kiuj signifas patro kaj fratino kaj lernejo kaj instruisto...'

Blokoj

Kiel oni vidas el la citaĵo el la libro de Lindén, li amasigis en bloko vortojn sammediajn, en la ekzemplo el la konstruista metio. Kompreneble oni ne bezonas lerni vortojn kiel *trulo*, sed estas avantaĝe scii, kie en la libro serĉi sammediajn vortojn. Simile oni trovas en *Tra la mondo* blokojn, ekz. el malsanula medio (p. 96), el kastela medio (p.87), el agrikultura (p.84), pri muzikiloj (p.81). La ĉapitro pri la afrika elefanto kaj tiu pri Esperanto kaj Zamenhof servas al 'ripozigo', paŭzo, en la cetere samfadena rakonto.

Miaj gepatroj, ambaŭ lingvo-instruistoj, trovis, ke mi, kiel bebo, ne kapablis diri *lys* (lumo), sed anstataŭe diris nur *ys*. Kiam, du jarojn poste, mia fratino naskiĝis, miaj gepatroj montris la lampon, dirante *ys*. Sed mia fratino ne volis diri *ys*, ŝi diris *lus*. Poste ambaŭ kredis, ke la vorto signifas *lampo*: lampo ja estas iom pli konkreta ol lumo! Jes, lingvo-instruado estas malfacila. Verki kontentigan por ĉiu lernolibron estas eĉ pli malfacile.

Johan Hammond Rosbach, Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg, Norvegio

Eksteraj rilatoj

CONTEXT:

Eŭropemaj instruistoj havas kuntekston

Atingis la redakcio la duan numeron de alloge prezentita magazino por eŭropemaj instruistoj kaj edukistoj (do, lernejestroj, gepatroj, membroj de lernejaj estraroj ktp.). Ĝi aperas trifoje jare sur 52 paĝoj en formato A4, kun koloraj kovriloj kaj fotoj interne. Ĝi estas du-lingva (franca kaj angla), kvankam redaktata en Nederlando. Ĝia dua numero aperis en 60.000 ekzempleroj. La magazino CONTEXT estas memstara sed kunlaboras proksime kun tri gravaj edukaj instancoj: AEDE, ATEE kaj ESHA (vidu la akroniman ŝlosilon apude, kiun ni prenis el la magazino).

Esence ĝi subtenas internaciajn projektojn en Eŭropo, ĝi forte subtenas la kulturajn aspektojn de la integriĝo de EK, sed laboras fortigi rilatojn kun edukistoj kaj klasoj en Centra Eŭropo, ekster la EK.

La dua numero raportis pri konferenco en Utrecht, kie kunvenis 400 lernejestroj el la tuta Eŭropo, kadre de nove lanĉita programo TEMP (Transfer of Educational Management Project – Projekto pri Transigo de Eduka Mastrumado). Enestas intervjuo kun S-ro Leo Tindemans, eks-ĉefministro de Belgio, pri la graveco de eŭropeca edukado. Aperas raporto pri Premio Komenio, aljuĝita en Lejdeno, Nederlando al la ĉeha filozofo kaj edukisto prof. Radim Palous. Komenio mem pasigis siajn lastajn dek kvar jarojn en Nederlando.

La tri organizoj AEDE, ATEE kaj ESHA prezentas siajn celojn (sed ne siajn adresojn!), krome aperas artikoloj pri edukado en Finnlando, kaj pri kuraĝa kunlaboro inter landlimaj lernejoj en Hungario kaj Aŭstrio dum la antaŭa epoko. La magazino akceptas leterojn, petojn de lernejoj por internaciaj kontaktoj kaj eĉ anoncas postenojn por instruistoj en privataj lernejoj.

Ni dankas al Renée Triolle pro la alsendo de la magazino; sen tio ni en Budapeŝto restus tute sen informoj. Ŝi mem jam skribis al la redakcio rekomendante Esperanton, letero en la nomo de la prezidanto pri la translimaj eblecoj de Esperanto estos konsiderata de la redakcio, kiu indikis, ke ankaŭ esperantisto el Britio skribis al ili.

La jarabono kostas 20 EKU; ni rekomendas al niaj membroj peti specimenan ekzempleron kaj poste aboni ĝin aŭ abonigi ĝin flanke de la lernejo. Temas ne nur pri Eŭropaj membroj, ĉar la magazino emfazas unuavice transnacian edukadon kaj tenas rilatojn ankaŭ kun amerikaj edukistoj kaj instancoj.

Kiel ni kunlaboru kun CONTEXT kaj similaj gazetoj? Por povi interŝanĝi organojn, ILEI devos prepari nacilingvan resumon de IPR. Tion ni provos fari ekde nun, angle kaj france. Due, ni povas kontribui novaĵojn aŭ eĉ fakajn artikolojn pri E-instruado. Ni povas peti interklasan kontakton el kaj al la plej ekzotikaj landoj, menciante, ke inter la korespondaj lingvoj estu Esperanto. Kial tiuj alvokoj kaŝiĝu nur en IPR?

Por sisteme kaj bone teni tiujn rilatojn, ILEI bezonas pli da helpantoj. En Budapeŝto ni luktas nur aperigi niajn du proprajn revuojn. Pro la lingvouzo de CONTEXT ni precipe bezonas kapablajn franc- kaj angla-lingvajn verkistojn aŭ tradukistojn. Ĉu iu ekzemple pretus ricevi provaĵojn de IPR kaj rapide verki por ni franc- aŭ angla- aŭ ali-lingvan resumon, uzebla en nia informlaboro?

Direktu konvene vian interesiĝon pri CONTEXT (menciante IPR/ILEI) al la redakcio. Vi povus skribi Esperante, tiukaze aldonu tradukon angle, france, germane, hispane, nederlande. Se tio ne eblas, povos esti, ke iu el nia Nederlanda sekcio pretus anonci sin por traduki ricevitajn leterojn.

CONTEXT, s-ro Anton A. van Rooijen, Prins Bernhardlaan 36, NL-3941 EB Doorn, Nederlando.

AKRAN EMON AKRONIMAN

Konciza gvido al ĝangalo de instancoj

AEDE: Association Européene des Enseignants. (Eŭropa Asocio de Instruistoj). Fondita 1956 kun 25.000 membroj en 16 landoj.

ATEE: Association for Teacher Education in Europe. (Asocio por Instruista Trejnado en Eŭropo). Organizas somerajn universitatojn pri instruista trejnado: En 1993 tio okazos en Nottingham, Britio en oktobro (!). CEEC: Comité Européen de l'Enseignement Catholique (Eŭropa Komitato pri Katolika Instruado)

CESE: Comparative Education Society in Europe (Societo de Edukada Komparado en Eŭropo ... aŭ ĉu tamen de Kompara Edukado?)

CIDREE: New Consortium of Institutions for Development and Research in Education in Europe. (Nova Konsorcio de Institucioj por Evoluigo kaj Esploro en Edukado en Eŭropo).

COFACE: Confédération des Organisations Familiales de la Communauté Européenne (Federacio de Familiaj Organizaĵoj de la EK).

EASE: European Association of Special Education (Eŭropa Asocio pri Edukado de Handikapuloj).

ECNAIS: European Council of National Associations of Independent Schools (Eŭropa Konsilio de Naciaj Asocioj de Sendependaj Lernejoj)

EEPG: European Education Publishers Group (Eŭropa Eduka Publikiga Grupo)

EFEA: European Forum for Education Administration (Eŭropa Forumo por Eduka Administrado).

EFECOT: European Federation of the Education of Children of Occupational Travellers (Eŭropa Federacio por la Edukado de Infanoj de Laborpostenaj Vojaĝantoj)

EPA: European Parents' Association (Asocio de Eŭropaj Gepatroj)

ESHA: European Secondary Heads Association (Eŭropa Asocio por Lernejestroj en Duagradaj Lernejoj). Havas 50.000 membrojn — lernejestroj kaj vic-estroj de gimnazioj, metilernejoj ks. Necesus trovi en ILEI lernejestrojn, (inkl. vic- kaj eks-) antaŭ ol aliri ĝin. Anoncu vin al ni!

EURO-ORIENTATION: European Association for Orientation, Vocational Guidance and Eduactional and Professional Information. (Eŭropa Asocio por Orientigo, Karier-gvidado, Eduka kaj Profesia Informado.

PLEASE: Permanent Liason Committee of European Associations in Education. (Daŭra Kunordiga Komitato de Eŭropaj Edukaj Asocioj). Nove starigita organo kun la apogo de la Komisiono de EK; ĝi kunordigos la laboron dek du supre listigitaj organizaĵoj. (Ĉiuj krom EEPG kaj CIDREE)

Pli da informoj pri tiuj kaj aliaj asocioj kaj eldonaĵoj bonvenaj. Se ni havus pli da laborfortoj – ĉu veran oficejon kun stabanoj, ĉu volontulaj kunlaborantoj – ni povus starigi kaj tenadi taŭgajn rilatojn kun tiuj kaj aliaj organizoj!

Diskutoj pri Esperanto en Pedagogia Kongreso:

Propono por la lingvopolitiko

De la 5a ĝis 9a de oktobro 1992 okazis en Heidelberg pedagogia kongreso pri la temo "Klerigado kaj edukado en Eŭropo". Ĝi celis diskuti, kiamaniere la lernejoj povas prepari la infanojn kaj gejunulojn por la eŭropa unuiĝo. Unu el la ĉefaj subtemoj estis la instruado de fremdaj lingvoj. Kontaktinte la organizantojn, mi tuj ricevis afablan inviton prezenti kadre de forumo pri "Multlingveco en Eŭropo" la esperantistan proponon por plibonigo de la internacia kompreniĝo.

La forumo arigis 10 profesorojn de pedagogiaj altlernejoj kaj kvindekon da lingvoinstruistoj. Ĝi komenciĝis per la temo "Lingvoinstruado en la elementa lernejo", kie la geanglistoj Prof. d-ro Hartmut Breitkreuz (Heidelberg) kaj Prof. d-ino Gundi Gompf (Frankfurt) forte pledis por lernado de la unua fremdlingvo ekde la tria klaso. Ili ricevis multe da apogo de la ĉeestantoj, dum malkonsento regis nur pri la demandoj, kiom serioza estu tiu frua lingvolernado kaj kiujn lingvojn oni tie instruu.

En dua parto oni pli detale traktis la demandon, kiujn lingvojn oni ofertu al la lernantoj. Plej rimarkinda estis prelego de la romanisto Prof. d-ro Hugo Blank (Karlsruhe), kiu forte kontraŭis la "imperiismon" de la angla lingvo, kiun li nomis "la Troja Ĉevalo de Usono en Eŭropo". Sed lia aserto, ke jam dujara instruado de la angla sufiĉu, dum oni pli multe lernu la francan, italan kaj hispanan, trovis multe da kontraŭstaro.

Sekvis mia referaĵeto "Propono por la lingvopolitiko", kies skriba versio estis disdonita kune kun la aliaj prelegotekstoj al ĉiuj ĉeestantoj. Ĝi rezultigis mirige senemocian diskuton, en kiu oni faris plurajn demandojn al mi kaj esprimis nur unu negativan rimarkon – nome, ke Esperanto malpli bone taŭgus por plenumi la pedagogian celon, konatigi la lernantojn kun la kulturoj de alia lando. Tiun opinion de Prof. d-ro Ronald Gaaler (Heidelberg) dividis Profino Gompf; tamen ŝi emfazis ankaŭ, ke ĉio, kio servas al la kompreniĝo inter la popoloj, estas salutinda.

Ŝi ne kontraŭis enkondukon de Esperanto en la lernejojn, sed atentigis pri la inerteco de nia lerneja sistemo, kiu ankaŭ malhelpas la realigon de siaj idealoj de abunda lingvoinstruado en elementaj lernejoj kaj en lernejoj por mensaj handikapuloj.

Mi sentis tre agrablan atmosferon dum tiu diskutado kaj tre kontentas pri tio, ke oni prenis Esperanton tute serioze kaj sufiĉe juste traktis nian aferon.

Ulrich Matthias, Germanio.

Se okazos similaj aranĝoj, bv. informi ILEI pri ili, eventuale ni organizos partoprenon. Se vi mem enlande povas aranĝi tion, tamen informu nin pri la rezulto kaj pri utilaj akiritaj informoj. Bona informa laboro dependas je kunlaboro inter ILEI centre kaj la sekcioj kaj aliaj aktivuloj!

Pedagogia kalendaro

ARANĜOJ POR INSTRUISTOJ KAJ JUNULOJ EN 1993

Februaro 28: 5a Instruista Seminario, KCE, pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Unutaga aranĝo de la svisa ILEI-sekcio kaj KCE. Prelegos Andres Bickel pri lertiĝado pri konversacio helpe de bildoj, sociaj ludoj kaj tekst-legadoj.

Marto (unua semajno): Internacia Konferenco de Amerikaj Esperanto-Asocioj, Havano, Kubo. KEA, Pf. 2018, C-10200 Havano, Kubo.

Aprilo 2-5: Junulara Esperanto- Renkontiĝo, (dum hungaraj feriotagoj) en Zalaegerszeg (sud-okcidenta Hungario), en studenthejmo. Kosto: ĉ. 2500 HUF. Juna Koro Esperantista Asocio, Pf. 263, H-8901 Zalaegerszeg.

Aprilo 4-8: Internacia Metodika Seminario (IMS), Zagrebo, Kroatio. Detaloj de KEU, Trg. Burze 2, HR-41000 Zagreb.

Aprilo 9-16: 9a PSI (Printempa Semajno Internacia), paska aranĝo por la tuta familio organizita de Germana Esperantro-Asocio en junulargastejo en vilaĝo Obernhards/Rhön. Detaloj de s-ro W. Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, D-W-5483 Bad Neuuenahr-Ahrweiler; tel. (02641) 4885.

Aprilo 24-30. Internacia Renkonto de infanoj, kun kursoj, promenado, distraĵoj, natur-studo, metiaj laboroj, verkado de staĝ-gazeto. (Por infanoj jam eklernintaj Esperanton.) Kastelo Grésillon, F-49150 Bauge, Francio.

Majo 7-9: Internacia Renkontiĝo de Korespond-kursanoj (instruistoj kaj lernantoj), 20 USD. Esperanto-Centro, Sobotske namestie 6, CS-058 01 Poprad, Slovakio.

Julio 3-16: Somera Esperanto-Lernejo (SEL93). E-Centro Poprad. 130 USD. (Ripetita 7-20 Aŭgusto.)

Julio 9-17: Intensiva Du-semajna kurso por Instruistoj: ILEI/KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando. Gvidos d-ro Duncan Charters, profesia trejnisto de lingvo-instruistoj en Kolegio Principia, Ilinojso, Usono.

Julio 17-18: Sesio de la elementa kaj meza lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI, en Kultura Centro Esperantista (KCE), Svislando. Nedeviga prepar-kurso estos ofertata tuj antaŭe.

Aŭgusto 1-7: 27a Konferenco de ILEI kun la 2a ILEI-Gimnazio. Apud Valencio, Hispanio.

Aŭgusto 7-14. 49a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Bulgario.

Aŭgusto 19-31. Kurso por instruistoj en Kastelo Grésillon.

Kastelo Grésillon proponas aranĝojn tra la tuta somero, KCE tra la tuta jaro, same la E-Centro en Poprad, Slovakio. Petu iliajn detalajn programojn rekte de ili!

PAGITA ANONCETO:

Kion ni faru, por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? Informas: S-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. (Bonvolu sendi koverton kun via adreso kaj du francajn poŝtmarkojn je 2,50 FRF aŭ 2 internaciajn respondkuponojn.

Similajn anoncojn pri pedagogiaj temoj ni akceptos je la tarifo de unu internacia respondkupono por ĉiu linio (aŭ 3 SEK aŭ 1 NLG). Petoj por klasa aŭ instruista korespondado, aŭ interklasa kontaktado estas aperigeblaj senkoste. Same, informoj pri estontaj pedagogiaj eventoj estas senpage akcepteblaj por nia kalendaro. Pedagogiajn librojn ni recenzos post ricevo de prefere du ekzempleroj.

Alvoko al instruistoj:

INTERNACIA KONKURSO PRI MODELA E-PAROLO

memore al Ivo Lapenna

Por etendi al Esperanto-tradicion de pluraj landoj ni lanĉas internacian konkurson (ĉi-jare por mezlernejanoj, t.e. por 15-19 jaruloj. De jaro al jaro alternos la konkurso laŭ celgrupoj: infanoj, junuloj, plenaĝuloj).

La konkurso volas turni atenton al bela, modela, por ĉiu klara kaj komprenebla parolo en Esperanto. La plej bonaj estos distingitaj per honoraj diplomoj de IVO LAPENNA (poste eble medaloj).

Ĉiu aliginto prezentos libere elektitan prozan tekston, ne pli longan ol 20 tajpitaj linioj. La instruisto mem ĵurios siajn aliĝintajn lernantojn kaj sendos la plej talentajn (ne pli ol 3 personojn) al landa konkurso, kie la konkursantoj denove prezentos siajn tekstojn kaj tuj poste, sen antaŭa sinpreparo, nekonatan tekston ricevitan samloke. Pri ilia vicordo decidos tri-membra ĵurio. La voĉoj de la kvin unuaj konkursantoj estos registritaj kaj la registraĵo estos plu ĵuriata de almenaŭ kvin kompetentaj personoj, apartenantaj al kvin diversaj naciaj lingvoj. Ĉiu el ili poentos ĉiun registraĵon ne konante la pritaksajn notojn (de 1 ĝis 10) de la ceteraj ĵurianoj. Ĉe prijuĝado estos konsiderataj:

1) Klara kuj regula prononco de ĉiuj sonoj kaj silaboj;
2) ĝustaj akcentado kaj intonado;
3) ritmo kaj laŭsenca disigo de penselementoj.

Aliĝo ĉe propra instruisto ĝis la 31a de januaro 1993. Loka konkurso: en la dua semajno de Februaro 1993. Landa konkurso: fine de Marto. Internacia ĵuriado: dum Aprilo. Prezento de la distingitoj ĝis la 15a de Majo 1993.

Ĉiuj instruistoj kies lernantoj deziras partopreni ĉn la konkurso Ivo Lapenna informu la iniciatinton s-ro Géza Kurucz ĝis la 5a de Februaro 1993. Adreso: Gimnazio Julia Bányai; vicdirektoro G.Kurucz; Nyiri ut 11, H-6000 Kecskemet, Hungario. *(eble necesos elastigi la unuajn el tiuj limdatoj – red.)*

STIPENDIOJ

Ni memorigas legantojn, ke stipendioj por junuloj restas peteblaj de nia sveda sekcio. En 1992 unu junulino partoprenis la gimnazion de Bratislavo tiumaniere, aliaj vojaĝis al Grésillon. Atendas motivitajn petojn: s-ro Ole Olsson, Södra Esplanaden 23, S-223 52 Lund, Svedio.

Stipendiojn regule aljuĝas ankaŭ NOJEF en Britio (t.e. Norwich Jubilee Foundation, Dr. Kathleen Hall, 37 Granville Court, Oxford, OX3 OHS). Du studentoj povis partopreni la UK en Bergeno kaj du en Vieno. Unu el ili pluiris al nia gimnazio en Bratislavo, la alia al la IJK en Kanado. Alia studento povis viziti la Duan Afrikan Kongreson en Benino — ĉiuj per la rimedoj de tiu fondaĵo. Unuavice ĝi ekzistas por esperantistoj ĝis 26-jaraj loĝantaj en Britio, sed esceptokaze ĝi subtenas aliajn, ekz. eksterlandanojn, kiuj vizitas familian aŭ junularan renkontiĝon en Britio. La fondaĵo havas kapitalon de 43.000 GBP kaj aljuĝis 2.900 GBP en 1992.

EKZAMENOJ

Okazis sesio de la ekzamenoj de UEA/ILEI en Vraca, Bulgario en oktobro 1992 kun du sukcesintoj. La plej granda sesio okazis en aŭgusto en la kvina Pacifika Kongreso en Qingdao, Ĉinio, kun 37 sukcesintoj (23 elemente, 14 meze.)

Fortajn gratulojn al la organizintoj!

La Proklamo de Voss

La debato pluiras — sed unuflanke!

Tra la jaro en diversaj gazetoj – ĝis inkluzive *La Nov-Zelanda Esperantisto* – nia proklamo el 1991 altiris reagojn. Du aperis en revuo *Esperanto* de UEA, ambaŭ estis senprokraste responditaj. Sed ĉar tiuj respondoj ne estis aperigitaj, la kritikaj asertoj kaj interpretoj prezentitaj restis sen kontraŭpezo. Por ke nia propra vidpunkto esprimiĝu almenaŭ en nia rondeto, ni aperigas la du leterojn kun niaj senditaj respondoj.

S-ro Goldman informis nin, ke lia letero estis forte koncizigita kaj reverkita, do ne tute spegulis liajn intencojn. Ni sendis kopion de nia respondo al li persone. Li intertempe respondis detale, trovante ĝin ankoraŭ ne tute kontentiga, sed pro spaco-premo ni ne povas aperigi tiun duan leteron. Tamen, la debato daŭras... Jen la du leteroj laŭ kronologia ordo. La unua sen ĝia unua alineo, kiu traktis alian temon.

Reagoj

Gloso al Voso

Komentante la Proklamo kaj la Manifesto

Tamen, mi sentas ke ne necesas aparta polemiko, se ni startas el la fakto ke Giorgio Silfer kaj Stefan MacGill rajtas revi malsamajn revojn. MacGill revas mondon kie ĉiuj kelneroj kaj hotelestroj alparolu fremdulon en esperanto, kie EK adoptos esperanton, kie nia lingvo estos deviga lernobjekto. Silfer revas mondon kie anstataŭ kelkcento da efektivaj esperanto-familioj estos centmilo. La diferenco inter la finvenkismo kaj la raŭmismo esence situas tie ĉi: ne en la ridinda aserto ke raŭmistoj ne volas varbi esperantistojn. MacGill rajtas peni, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj premu ĉe la institucioj; Silfer rajtas labori, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj vivu nian vivmodelon. MacGill rajtas revi ke iu mikrosocia idealo transiru al makrosocia realo; Silfer rajtas revi ke la makrosocio ne malhelpu la kreskon de ideala mikrosocio.

Giorgio Silfer (Eŭropo)

Traŭmo je Raumo

Denove Giorgio Silfer trudas al mi ne-akcepteblajn kaj ekstremajn starpunktojn (*Esperanto*, aprilo p. 79, aperinta junie). La Proklamo de Voss ja volis ponti inter raŭmistoj kaj finvenkistoj, sed el tio, li ne rajtas konkludi, ke mi estas dogmema finvenkisto. Ke kelneroj kaj hotelistoj scipovu po cent vortojn de Esperanto rangiĝas malalte sur mia revolisto.

Mi verkas lernolibrojn – ILEI entute agadas – ne por bredi rason da ŝajn-verdaj kelneroj, eĉ ne por nur instrui la lingvon, sed por prezenti dum la instruado la E-komunumon kaj -kulturon kaj logi studantojn aktive partopreni ĝin.

Ĝojinde, ke raŭmistoj volas varbi – ili verŝajne faros tion kelkajn gradojn pli inteligente kaj efike ol averaĝa flago-svinga samideano. Supozeble, ili ankaŭ volas instrui, ĉar neniu skolo povas preteratenti tion kaj travivi; la mikrosocia idealo so-

nas bele kaj estas efektive alloga – mi mem preferus vidi nin progresi per ĝia fortigo, se nur ĉar tiel la evoluo restas ene de nia influeblo. Tamen, ne eblas deskribi la grandan mondon. Estas iluzio pretendi, ke la mikrosocio kaj makrosocio estas apartaj paralelaj mondoj el kiuj oni povas elekti – raŭmistoj unu, finvenkistoj alia. Reale, ni ĉiuj konstante pendolas inter la du, kaj ambaŭ necesas.

La fatala miskalkulo de raŭmismo estas, ke tiu mikrosocio ne tenas ene de si adekvatajn rimedojn regeneri sin. Por prosperi, ĝi devas konstante aperi kaj aktivi en la makrosocio el kiu ĝi tiru novajn adeptojn kaj fortojn.

Voss precize diras, ke ni ne fordiboĉu niajn limigitajn rimedojn per ekstravagancaj varb-projektoj, ekz. ĵetante milionojn da varbiloj el helikopteroj (la pinto de desuprismo!), ĉar tiuj rimedoj utilus pli fortigante la ekzistantan komunumon. Ni elpaŝu publike precize kiam ni povas oferti konkretan servon (aranĝon, kurson, eldonaĵon, vojaĝon, literaturaĵon) tra kiu la nov-varbitoj povas vidi kaj eniri la vivantan komunumon.

Ankaŭ la aserto, ke nia lingvo iĝu deviga lern-objekto bezonas pied-noton. ILEI eĉ statute estas por la oficialigo de Esperanto en lernejaj sistemoj – sed ne sub ajnaj kondiĉoj. Post diskutoj en nia ĵusa konferenco ni povus listigi la antaŭkondiĉojn:

- Estu sufiĉe da kontentige trejnitaj instruistoj.
- Estu sufiĉe da lerniloj kaj apogaj materialoj.
- Estu manieroj trejnadi novajn instruistojn kaj apogi kaj plutrejni praktikantajn.
- Estu ĝenerale favora opinio por Esperanto flanke de la instruistaro, gepatroj, lernantoj kaj lernejestro.
- Estu adekvata la ĝenerala instru-nivelo kaj -etoso en la lernejo.

Se iuj el tiuj faktoroj signife mankas, preferindas eviti aŭ limigi la devigan instruadon, kaj koncentriĝi je libervola, provante samtempe plenumi la mankantajn punktojn. Pli aĝaj lernantoj foje rajtas elekti el pluraj stud-temoj; tiukaze la devigo ne estas absoluta. Granda respondeco falas sur la instruiston komuniki dum la kurso sian entuziasmon por la lingvo. Estus erare trejni amasojn da instruistoj, kiuj ne esence apartenas al la komunumo, nur por plenumi programon de deviga instruado.

Tial ILEI koncentriĝas nuntempe, ne je kampanjoj devigi la instruadon, sed organizos serion da kursoj por instruistoj, kaj trovos aŭ trejnos profesiulojn, kiuj povos gvidi tiajn kursojn. Unuavice, ni faros tion pere de niaj propraj rimedoj ene de nia mikrosocio, sed ni povus – laŭ la spirito de Voss – aliri edukajn instancojn por apogo en oficiala starigo de kelkaj tiaj kursoj. Tio nuntempe multe pli utilas ol vast-skala rezoluciado postulanta tujan enkondukon de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la mondo.

Stefan MacGill (Eŭropo/Antipodio)

Voss neniel defetisma

La Proklamo de Voss certe ne celis defetismon, kiel legis ĝin s-ro Goldman (*Esperanto*, jul-aŭg 92). La agado de ILEI: gimnazio lanĉita, ekzamenoj kreskantaj, intensa lernila eldonado, instruista trejnado, neniel defetismas, male, ĝi alfrontas la bezonon praktike.

Ni komprenis sub "aplikistoj" ne nur komercistoj, sed ĉiuspecaj uzantoj: verkistoj, kapablaj instruistoj, sciencistoj, politikaj aktivuloj, ĝis inkl. literaturaj eldonistoj kaj edukaj organizantoj (tiaj, kiuj povus ekz. malfermi kaj financi internacian lernejan projekton).

Kvankam ne tute malebla, ni ne imagis unu "mega-savanton", sed gamon da aplikantoj ĉiuskalaj, plurkampaj kaj diversloke, unu post unu logendaj. Se ni studas la lastajn jarojn ni trovos kazojn de unuopuloj, kiuj konatiĝis kun la lingvo, rapide majstris ĝin kaj baldaŭ aplikis ĝin kun sukceso. Kion ni ne vidas, estas la miloj da potencialaj "savantoj" kiuj neniam engaĝiĝis, ĉar la Movado ne estis en la ĝusta loko en la ĝusta momento kun la trafa oferto (informoj, argumentoj, kurso). Jen nia tuja tasko, ĉar novaj aplikistoj ĝenerale ne savas nin komplete de ekstere (kiel per registara dekreto), sed unue konatiĝas kun la lingvo, se ne lernas ĝin, kaj kun la komunumo. Unue, ili iugrade iĝas "unu el ni", tiam ili aplikas siajn grandmondajn spertojn. Ju pli la vojo enen malfacilas, ne estas bone signita, makulita de obstakloj, des malpli da aplikistoj ni akiros. Voss tute ne vokas al pasiva atendado – precize la malon. Niajn novajn fortojn ni devas kapti!

Tamen, defendeblas la vidpunkto, ke sole per niaj propraj nunaj fortoj ni ne atingos signifajn globalajn kreskojn. Ni devas dementi la ideon, ke per dek aŭ tridek procenta kresko en nia agado, ni decide antaŭpuŝus nian aferon kaj kreskigus la suman komunumon. Ni kalkulis, ke necesus dekobligi la nunan kvanton da instruado kaj instruista trejnado, antaŭ ol ni povus aserti kun certeco, ke la suma nombro da parolantoj signife kreskas. Ĉiu intensigo ĝis dekobligo nur stabiligos nin aŭ limigos malkreskon.

Se ILEI streĉos ĉiujn fortojn, eble ĝi povos duobligi aŭ triobligi sian agadskalon, sed nek ĝi, nek la nuna movado trovos la homajn kaj financajn rimedojn dekobligi la instruadon. Tio bezonus aŭ ĉesigon de agado sur ĉiu alia kampo kaj investo de ĉiuj rimedoj en edukadon (kion la movado ne akceptos) aŭ la enverŝon da la rimedoj de nove persvaditaj aplikistoj. Por ekspluati tiujn, sufiĉas ne nur logi ilin enen kaj bonvenigi ilin, sed krome doni al ili la necesan agliberecon kaj subtenon.

Stefan MacGill, ILEI/NZ.

Pri movada strategio

Vosismo = verda defetismo

La Proklamo de Voss (okt. '91, p. 189) aspektas instiga, entuziasma, eĉ optimisma. Mi trovas ĝin tamen bedaŭrinda. Mi specife malkonsentas kun la aserto: "Signifa [...] salto en la uzo de Esperanto ne okazos:
– *sole* per la klopodoj de la nunaj parolantoj [...]
– *sen* la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta [...] ĝis potencialaj aplikistoj [...] malkovros kaj ekspluatos la lingvon" [emfazo de s-ro Goldman].

La sinteno de la Proklamo estas nur la plej nova ekzemplo de la deziro por ekstera Savanto. Pli frue oni atendis aprobon de registaroj. Nun oni evidente transiris al atendado por entreprenistoj, la t.n. "aplikistoj". Tio egalas defetismon. Ĉiu esperantisto estas ja "potenciala aplikisto". Faru ĉiu kion li mem kapablas, en siaj fako, hobio aŭ kvartalo, por plivastigi la aplikadon de la internacia lingvo, kaj ni ne atendu la intervenojn de eventualaj "savantoj"!

Thomas A. Goldman (Usono)

Aktivecoj el landoj kaj sekcioj

(Tri paĝoj pli da landaj novaĵoj ekde paĝo 38).

Katalunio: Instruista seminario

La 6-an kaj 7-an de septembro okazis en Sabadell instruista seminario kun 10-15 homoj. Sabat-matene Llibert Puig kaj Hekor Alos prezentis la historion de la katalunaj versioj de la Zagreba Metodo. Oni diskutis plibonigojn de la nuna eldono por enkonduki ilin en la pretigata nova eldono por la tuja lernojaro. Posttagmeze Gemma Armadeus prezentis panoramon de modernaj legolibroj por komencantoj kaj progresantoj. Post ŝi Jomo Milla transdonis la ĵus ricevitajn sciojn el instruista seminario gvidita de d-rino Koutny Ilona el Hungario en KCE, Ĉaudefono, Svislando. Dimanĉmatene, post nokto en la Sabadela ĉeffesto, Hektor Alos klarigis pri la novaj instruprogramoj en ILEI, Bulgario kaj Hispanio. Pedro Martin aldonis sian personan sperton kiel ekzamenito en la internacia ekzameno dum la Viena kongreso.

La kunvenintoj decidis rekte alpreni la internacian normon de ILEI, sen aldono de naciaj specifaĵoj. Oni konstatis, ke en 100-hora kurso oni ne povas atingi la elementan nivelon de ILEI. Sekve la unua lernojaro enhavos la materialon de la Zagreba A-nivelo, kaj fine KEA mem starigos propran ekzamenon, kun testado de tre bazaj movadaj informoj (ekz. Pasporta Servo). La dua lernojaro estu tia, ke oni atingu la elementan nivelon de ILEI; necesos aldoni ĉefe E-kulturajn instruojn. La tria jaro finiĝu per la meza nivelo de ILEI.

Oni rekomendis al ĉiuj instruistoj ekzameniĝi kaj partopreni en la ILEI-konferenco apud Valencio.

(El Kataluna Esperantisto)

Nederlando: Seminario pri instruado

Sub la aŭspicio de la Nederlandaj Esperanto-Organizoj, nia sekcio NGGE organizos seminarion la 3an kaj 4an de aprilo 1993 en Schoorl, kie laŭpromese la vetero belegos. Kosto: 25 NLG. Temo: Ĉu ni povas pozitive ekuzi la spertojn el la instruado de aliaj lingvoj por Esperanto? Oni konvinkis D-ron Wil Knibbeler, lingvisto de la universitato de Nijmegen, akompani la seminarion kaj doni konsilojn kaj kritikojn pri ĉiuj eroj. (Vidu recenzon de lia libro en IPR 4/91, p. 27). Anoncu vin ĉe Esperanto 100, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando.

(El **NGGE Sciigas**)

Usono: kalkulo en jubilea jaro

En 1991-1992 okazis 41 oficialaj klasoj entute (32 elementaj, 5 progresintaj, 4 superaj kun entute 380 kursanoj (ĉ. 190 plenaĝuloj, 20 junuloj kaj 170 infanoj). Kursoj donantaj kreditojn estas 10, el kiuj 3 estas devigaj. En 1992 nia amerika sekcio AAIE festis sian tridekan datrevenon; fondis ĝin en 1959 George Falgier, instruisto en elementa lernejo en St. Louis, Missouri. En la jarkunveno elektiĝis vic-prezidanto Tom Corr kaj eduka sekretario s-ino Ellen Eddy.

(El AAIE-bulteno - sept.)

Albanio: Esperanto prezentita

Nia reprezentanto en Albanio, s-ro Bardhyl Mezini, aŭtoris trion-paĝan artikolon en grava ĵurnalo pri la valoro kaj nuna stato de E-instruado, detaligante la kontribuon, kiun ĝi povus fari al la ĝenerala kleriĝo en albanaj lernejoj.

Kroatio: reviviĝoj en la ĉefurbo

Restariĝis Esperanta instruado en kelkaj zagrebaj lernejoj, kiuj aspiras internaciajn kontaktojn kaj kuraĝigajn leterojn: Osnovna skola 'Mladost', Esperanto (prof-ino Marija Jerkovic), HR-41020 Zagreb; Osnovona skola Miroslav Krleze, Esperanto (s-ino Klara Stipetic), HR-41020 Zagreb; Osnovna skola M. P. Miskine, Esperanto (f-ino Kornelija Pavlic), Sveti duh, H-41000 Zagreb.

(El Letero el Zagrebo - okt)

Paroloj kun bavara ŝtat-sekretario

Ses-persona delegacio de nia germana sekcio AGEI, kunlabore kun la Eŭropa Unio, sukcesis interparoli kun la ŝtat-sekretario de edukado en Bavario, s-ro Hermann Leeb. La ĉefaj celoj estis restarigi kaj reguligi kontaktojn, aktualigi la staton de ministeria informiteco, kaj strebi al serioza pritrakto de E-instruado. Responde, la sekretario emfazis, ke AGEI mem devas prezenti laborkonceptojn, evoluigi la didaktikon, ellabori instrumaterialon kaj zorgadi pri la aktualeco de ministeria informiteco.

(El E-Aktuell)

Recenzoj

Kompara lingvistika studo

La unua doktoriga disertacio en Koreio temante pri Esperanto estis akceptita en 1992. La nova doktoro, s-ro Bak Ĝi-ŭan, iama sekretario de KEA, nun estas studisto en la Instituto de Orientologio en la Universitato Dankook. Lia 183-paĝa disertacio, prezentita al la Fako de Korea Lingvo kaj Literaturo de la Kon-Kun Universitato, titoliĝis 'Studo pri morfologia kontrasto de la Korea kaj Esperanto.' Ĝi aliras la temon laŭ kvar ĉefaj subtemoj – vort-farado, konjugacio, deklinacio, kaj diversaj kategorioj. Kelkaj eroj:

- La korea havas formojn analogaj al -ant, -at, kaj -ig, sed ne al -iĝ, sekve lernantoj konfuziĝas inter -iĝ kaj -at.
- La Esperantaj formoj [afikso +finaĵo] aŭ [prefikso +sufikso +finaĵo] havas nur tre malmultajn analogojn en la korea.
- La Esperanta volitivo respondas al du modoj en la korea (ordona kaj persvada).
- Uzo de la pluralo ne estas deviga en la korea. Ĝi ja havas akuzativon kun simila uzado kiel en Esperanto, tamen koreaj studentoj de Esperanto ofte misuzas ĝin post prepozicioj, pro negativa interfero el la praktike senakuzativa angla, tipe ilia unua fremda lingvo.
- La korea havas ok tempo-indikojn (reala, rememora, ne-decidita, finita, ne-decidita-rememora, finita rememora, finita-supoza kaj finita-ne-decidita-rememora), starigitaj laŭ tute alia bazo ol tiuj de Esperanto.

La studo mem estas en la korea lingvo, sed fine troviĝas dek-paĝaj resumoj en la angla kaj Esperanto. Tiu lasta estas lingve pli akceptebla ol la antaŭa, kiu atestas la realan bremson al efika komunikado kiun starigas la deviga uzo de fremda nacia lingvo. Rimarkeblas, fakte, iom da negativa interfero el Esperanto en la anglan (kiu estas bedaŭrinde pli ol kelkaj gradoj malpli logika kaj vortorde fleksebla ol ĝi).

Ĉiuokaze salutindas tiu pionira doktoriga verko en lando, kiun vizitos en 1994 la internacia komunumo.

Novaj elpaŝoj pri distanc-lernado

La Centro por Esploro pri Teleinstruado (CRIAD), kadre de la Klerigscienca Departemento en Roma Universitato 'La Sapienza', jam de ses jaroj okupiĝas pri malĉeesta lernado. Aranĝante perfektigajn malĉeestajn kursojn por miloj da instruistoj de la italaj lernejoj, oni planas kaj eksperimentas novajn kurso-modelojn kun aŭtomata pritaksado de lernosukcesoj kaj alpersonigo de instrumaterialoj. En 1991 oni lanĉis novan revuon *IAD – Istruzione a Distanza* pri tiuj temoj, kun kontribuoj de fakuloj el la tuta mondo. La revuo aperas en la itala lingvo, tamen la eseaj artikoloj en ĝi havas resumojn en la franca, angla, hispana, germana kaj Internacia lingvoj. Eldoniĝis ĝis nun kvin numeroj. Al petontoj ni povos sendi senpagajn specimenojn: Prof. Vertecchi kaj Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione,

Via del Castro Pretorio, 20, I-00185 Roma, Italio.

Klerigkibernetiko estos kompilo de 105 diversaj sciencaj raportoj pri la temo arigitaj de d-ro Helmar Frank kaj liaj helpantoj inter 1973 kaj 1992. La verko aperos en januaro 1993 kaj kostos en butikoj 60 DEM, sed estas mendebla rekte je 30 DEM (se ni bone komprenis la germanlingvan informilon). Ricevinte informojn en ILO ni aperigos pli kompletajn detalojn. Petu de: Institut für Kybernetik, Kleineberger Weg 16B, D-W-4790 Paderborn, Germanio.

Ludi por ridi estas la ĉeftitolo de nove aperinta libro, kies subtitolo klarigas pli la enhavon: 'Kunagadaj ludoj por grupoj'. Per tio multaj jam divenis, ke la aŭtoro devas esti Gilena Tilleux-Craenhals el Belgio, kiu en nia lasta konferenco kaj gimnazio demonstris plurajn el tiuj ludoj, aktivigante la partoprenintojn. La 80-paĝa libro enhavas plurajn fotojn montrante la realigon de la ludoj, inkluzive de unu el Bratislavo. Prez-informon ni ne havas: turnu vin al via propra Libroservo.

La seĝo dektria estas dudek-du paĝa rakonto verkita de George E. Wagner en Usono en 1957 specife por lernantoj. Ĝi rakontas en simpla lingvaĵo taŭge kompliketan intrigon ĉirkaŭ heredaĵo de tereno en Usono al la postsekvintoj de belgaj enmigrintoj. Romantiko ne mankas al ĝi. Ĉi tiu korektita eldono estas eldonita de ELNA en konvena grafika aspekto.

Sub influo de alkoholo, de J. Herbert Sullivan, prezentas dek du tre mallongajn rakontojn same taŭga por kursanoj. La lingvaĵo estas klara kaj trafa, la temoj variaj kun la personecoj kaj scenoj bone kreitaj. La plej malfacila punkto en tiuj tre koncizaj rakontoj estas atingi kontentigan finon – kelkaj sukcesas pli ol aliaj – tiuj, kiuj ne tiom plaĉis ĝenerale havis iun ligon kun morto, akcidento aŭ misfaro. Sed efektive iuspeca morala temo aŭ dilemo ofte enestas. Eldonis: Flandra E-Ligo.

La ronkanta avo de André Weckman estis tradukita de Edmond Ludwig. Avo Klazen retrovas vivenergion dank' al brua aro da infanoj, kiuj postulas vivindan vivon en griza industria urbo. La rakonto celas kaj infanojn kaj gepatrojn. Ĉiuj el la sep ilustritaj (Pierre Lataste) ĉapitroj taŭgas kiel paroligilo dum konversaciaj kursoj. Eldonis Orientfranca E-Federacio: 25 FRF.

Avo-fungo kaj aliaj rakontoj, ok originalaj rakontoj de Jean-Louis Claudel. Malicaj buboj petolas tra la vogeza kamparo, dum la pliaĝuloj foje ŝerce, foje malĝoje vivas sian vivon en epoko, kiam la moderno ankoraŭ ne tre modernis! 33 paĝoj da spriteco kaj nostalgio. Sama eldonejo: 30 FRF, ambaŭ verkoj ofertataj kun signifaj rabatoj por kvantoj: Mendo ĉe: Libroservo, 12, rue E. d'Orves, F-54490 Piennes.

Duobla Spiralo, originale verkita de Zlatko Tisljar. 140-paĝa broŝurita vivohelpilo por adoleskuloj kun klaraj kaj simplaj klarigoj pri multaj temoj el la vivo: moralo, socio, scienco. Aranĝita laŭ 40 ĉapitroj inter kiuj: baza naturlogiko, homo kaj socio, kredo kaj religio, spaco kaj tempo, intuicio kaj scio, ekvilibro kaj memsugesto, amo kaj familio, scienco kaj mistiko, subjektiveco kaj vero, organizo kaj kaoso, moralo kaj humanismo, arto kaj modo, milito kaj paco, vivo kaj morto, bono kaj malbono, sekso, ekonomio, lingvo, ekologio, politiko, kompreno. Prezo: 120 ATS; 19,80 GLD. Tiu kaj aliaj titoloj de Libroservo de Interkulturo, Kočevarjeva 12, SLO-62000 Maribor, Slovenio.

Kompilis:smg

Ne forgesu la libroservon de ILEI, kiu daŭre proponas al vi titolojn. La oferto de HEA en IPR 92/3 validis nur ĝis la jarfino, sed la samloka listo kaj mendilo de ILEI daŭre validas.

La unua kajero de *Tendaraj tagoj* estas nun elĉerpita ĉe ILEI, kvankam aliaj libroservoj verŝajne tenas plu stokojn. La dua kajero restas havebla de ILEI en Budapeŝto kaj de UEA je 15 NLG (10 NLG ekde 3 ekz. al unu adreso). Ĉe ILEI la sendokostoj estas inkluzivitaj. Ambaŭ kajeroj restas haveblaj de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio: TT1 je 222 BEF kaj TT2 je 280 BEF.

Eventoj

La Estraro de ILEI en sia marta kunsido de Budapeŝto pritraktos kontrakton pri kunlaboro kun la nova dusemajna revuo *Eventoj*, preparata samurbe kiel IPR. Grava pluso de tiu revuo estas ĝia aperofteco, kompare al IPR kaj al la plimulto de ceteraj movadaj revuoj. Gia kapablo rapide dissemi novaĵojn povas esti tre utila por fakaj kaj landaj asocioj kiel ILEI. Ekzemplo estis nia instruista kurso en Poprad komence de novembro. Almenaŭ unu el la ok partoprenantoj eksciis pri la kurso kaj aliĝis nur pro *Eventoj*. Plenaj informoj, dissenditaj en julio al la E-gazetaro pere de IPR kaj aparte, simple ne atingis la homojn ĝustatempe. Pro la kongresa numero kaj malfruo de *Esperanto*, la informo sendita en julio povis aperi en nur 4-linia anonceto en la septembra numero (kun preseraro en la inform-adreso), kiu tamen atingis la publikon fine de oktobro, apenaŭ semajnon antaŭ la kurso. Fronte al tiaj komunikaj obstakloj, necesas konkludi, ke *Eventoj* havas validan kaj valoran rolon; ni rekomendas al niaj membroj abonadon: 59 NLG ĉe UEA, en naciaj valutoj ĉe multaj perantoj, rabat-kotizoj por pluraj landoj. *Eventoj* reciproke regule disponigadas lokon al informoj de ILEI kaj pri instruado, kies gravecon ĝi plene rekonas. *smg*

El la sekcioj kaj landoj

Britio: la barlastona tradicio pluiras

Esperantaj somer-kursoj floradis en Barlaston apud Stoke-on-Trent meze de Anglio jam de 1960. Dum dudek kvin jaroj la kursoj estis prizorgataj de s-ino Marjorie Boulton kaj altiris la plej renomajn lekciistojn kaj gvidantojn. Ekde la nuna jaro la superrigardan gvidadon transprenis nia membro s-ro Paŭlo Gubbins. En *Esperanto Teacher* li klarigis, ke la unika etoso de la kursoj ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke la prizorganto de la gastiganta kolegio estas aktiva esperantisto (d-ro Derek Tatton), ĝi havas respektindan bibliotekon kaj regule gastigas aliajn E-aranĝojn.

La kursoj estos plue ofertataj je tri niveloj – komencanta, meza kaj supera. Precipe en la lastaj du la emfazo kuŝos je parola kapablo. Konversaciigaj tekstoj, ofte prenitaj el *Monato* rolas centre en la laboro. La rolo de traduk-ekzercoj malemfaziĝas, kaj unuafoje literaturaj verkoj (de Jean Forge) estis anticipe anoncitaj kiel bazo por studo kaj lekcioj. La partopreno de nur du eksterlandanoj, kaj granda gamo da niveloj kaj aĝoj estis inter la obstakloj por la nova gvidanto, sed estas klare, ke la aranĝo sukcese pluiras. La iama admona slogano *Ne krokodilu*, transformiĝas al la pli pozitiva *Ĉie, ĉiam*.

La kursoj en 1993 okazos de la 7a ĝis la 13a de aŭgusto; detalojn petu de: The Warden, Wedgewood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG, Britio (tel. 0782 372105).

El la sama gazeto (kies ricevon ni dankas) ni ekscias, ke la ŝtata lingvo-ekzameno GCSE altiris 39 kandidatojn en 1992, kompare kun 23 kaj 45 en 1991 kaj 1990 resp. En 1992 nur 54% el la kandidatoj ricevis la kontentigajn gradojn A, B aŭ C, do aŭ la nivelo de la kandidatoj malaltiĝis, aŭ la ekzameno aŭ ĝia prinotado severiĝis.

Pola ILEI-sekcio reviviĝis kaj bone aktivas

En septembro tiu sekcio okazigis inaŭguran kunvenon en la sidejo de Silezia Esperanto-Asocio en Vroclavo, en sud-okcidenta Pollando. La trideko da partoprenantoj aŭdis raporton de Maria Czekanska pri la Konferenco en Bratislavo. Sekvis balotado por nova sep-persona estraro el naŭ kandidatoj kun sekva rezulto:

S-ino Maria Czekanska (sekciestro); S-ro Antoni Tabacki (vic-sekretario); S-ino Teresa Pomorska (sekretario); s-ino Jadwiga Nowak (kasisto); s-inoj Ewa Bondar, Elzbieta Grzebien, s-ro Andrzej Kraszewski (membroj). Sekciaj komitatanoj estos Maria Czekanska kaj Grazyna Mirkiewicz, kun rezervulo s-ro Tabacki.

La programo inkluzivis fakan prelegon de s-ro Antoni Golonka: "Esperanto kiel venka fenomeno." kaj finiĝis per organizaj aferoj. Decidite kunveni tutlande trifoje jare (feb. kaj junio 1993); varbadi por ILEI, informadi en edukaj rondoj pri Esperanto, esplori problemojn de E-instruado, inkluzive de la (re-oficialigo de la lingvo en instruprogramoj. Sekciaj kunsidoj estos malfermaj al nemembroj. La sekcio mendis tridekon da *Juna amiko* por 1993 kaj sendis 3 partoprenantojn al la instruista seminario en Poprad novembre.

IO BOLIS EN BOLIVIO KAJ BRAZILO

Fine de decembro 1991 mi alvenis al Bolivio por fari tie dumonatan Esperantan laboron. La kontakto kun gesamideanoj komenciĝis en la administra ĉefurbo, La Paz, kie mi trovis d-ron José Roberto Arze, kiu unuafoje kontaktiĝis kun Esperanto en Kolombio. Li bedaŭrinde ne aktivas por disvastigi nian lingvon pro laboraj kialoj, sed li ĉiam plezure akceptas eksterlandajn gesamideanojn, kiuj tamen malofte venas. Pro striko, kiu paralizis la landon, mi povis pluvojaĝi nur post kvar tagoj. En la flughaveno de Cochabamba atendis min alia UEA-delegito, s-ro Alfred Petrov. Tuj ni organizis bazan kurson laŭ la Cseh-metodo, kun forta apogo de loka ĵurnalo, tiel ke 14 homoj estis allogitaj kaj finis la kurson. La kurso inkluzivis informojn pri la E-movado. Ĉi tiu estis la unua kurso ofertita en Bolivio, la kursfinintoj decidis formi klubon. Ili volonte ricevos librojn, vortarojn, E-revuojn kaj kuraĝigajn leterojn: S-ino Wilhelmina Verhaaf, Casilla 3945, Cochabamba, Bolivio.

De tie mi pluvojaĝis kvar tagojn al Manaus en norda Brazilo, kie akceptis min varme geesperantistoj. Mi gvidis alian kurson kun 26 homoj plus pliaj interesiĝantoj, kaj restis tri semajnojn. La sekva halto estis la ĉemara urbo Natal. La Potigvara E-Asocio tie sukcesis aperigi konstante informojn en loka ĵurnalo kaj akiri taŭgan urbocentran kursejon por baza kurso. (vidu la foton).

La Nordorienta regiono de Brazilo decidis uzi nur Cseh-metodan instruadon kaj invitis min gvidi A-seminarion. La menciita baza kurso permesis al la seminarianoj vidi la metodon en la praktiko. La dek-tagan seminarion partoprenis 14 reprezentantoj el diversaj nordorientaj ŝtatoj: Paraiba, Ceará kaj Rio Grande do Norte. En kunvenoj oni diskutis pri lingvo-instruado kaj la specifaj trajtoj de Latin-Ameriko, kie oni praktike uzas nur du lingvojn, la hispanan kaj la portugalan. Oni decidis starigi regionan kunlaboron pere de Laborkunsidoj de la Nordorientaj E-Asocioj.



Mi vizitis ankaŭ Joao Pessoa, kie la klubo starigis ekspozicion de E-libroj kaj poŝtmarkoj. La televido filmis la inaŭguron, kiun ĉeestis reprezentanto de la urbestro. Kadre de tiu malfermo mi prelegis pri Esperanto kaj ĝia nuntempa graveco kaj montris la lumbildan kompleton de la internacia ekspozicio de UEA. Pluraj aliaj vizitoj kaj partopreno en Zamenhofa festo fermis tiun Brazilan vojaĝon kaj mi reiris al Bolivio, antaŭ ol ekiri al Eŭropo deĵori ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Atiljo Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, RA-5000 Cordoba, Argentino.

Vjetnamio: Nova grupo en Hue

Post 18-monata preparado, la konata E-aktivulo Ngo Do Khanh el urbo Ho Chi Minh pasigis en la somero de 1992 tri monatojn en Hue, la iama ĉefurbo en centra Vjetnamio. Sub la devizo 'Esperanto, la internacia lingvo de la jaro 2000...?' li prelegis kun ekspozicio en oficejoj, lernejoj, junulara asocio, virina asocio, en fremdlingva fakultato, lernejo por medicinistoj, en klubo de emerituloj kaj en pedagogia Universitato. Kursoj servis en ĉiuj el tiuj ejoj. Amika renkontiĝo estis aranĝita, kun la partopreno de nederlandaj vizitantoj, ges-roj Pijnacker el Nederlando. La kursanoj plustudas hejme per *Nouveau cours d'Espéranto avec ou sans professeur* kiun sendis franca esperantisto A. Frangeul. Pliaj materialoj kaj apogo bonvena ĉe: S-ro N.D. Khanh, 359/41.A Le Van Sy, Q3, Ho Chi Minh City, Vjetnamio. Por permesi al ni respondi ni afable petas aldoni 2 irpk.



POST-SKRIBO-TABLE

Konferenco: Ni ĵus eksciis, ke la junulara gastejo kiun ni deziris kaj petis mendi ne estos je dispono. Sekve nur en la venonta IPR ni povos aperigi aliĝilon kaj informilon. Ni strebos povi plue proponi simile modestan kotizon. Sekve ankaŭ pri la gimnazio ni ne povas firme anonci informojn, sed la kotizo tre similos al tiu en Bratislavo. Kiu volas anonci partoprenontojn (inter 13- kaj 16-jaraj) skribu al s-ino Zs. Barcsay (adreso, p2.)

IMS: Ni esperis aperigi aliĝilon ankaŭ por ĝi, sed informoj tro malfrue atingis nin: datoj 3-8 aprilo, Zagrebo, 200 DEM por orientanoj kaj 260 DEM por okcidentanoj. Paralele okazos Cseh-seminario, internacia ekzameno, internacia renkontiĝo por gelernantoj kaj ekspozicio de lernolibroj. Por aliĝi skribu al la kroatia sekcio (adreso sekvont-paĝe).

Nacilingvaj resumoj: Ni intencis aperigi nacilingvan resumon de nia jarkolekto; elĉerpiĝis nia spaco, tempo kaj energio (en tiu ordo). kaj estonte fari tion por ĉiu numero. Por eksteraj rilatoj praktike la angla kaj franca estas la plej utiligeblaj lingvoj kaj la redakcio disponas je ili. Plej ekonomie estas presi tiujn resumojn fine de la revuo, ekzemple sur unu paĝo. Kion opinias la legantoj, ĉu ni faru tion aŭ eldonu ilin nur sur aparta aldonebla folio.

Estrarkunsido de ILEI: Budapeŝto 26-28 mar 1993. IPR 93/1 estos pretigita ĝis tiam kaj portos postskribe raporton pri la decidoj.

Komitato: Ĉu via sekcio jam nomis siajn komitatanojn skribe?

Bondezirojn por sukcesa instruado en 1993!

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, CS-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, F-74920 Combloux.
Germanio: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio: vakas
Korea Resp.: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Zdenka Svetličić, Kroatia E-ista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb
Nederlando: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Turnu vin al NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
Pollando: Maria Czekanska, str. Kotarska 6/3, PL-50-150 Wroclaw
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, R-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo: Ing. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaĺre)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl Mezini, p/a Albana Esperanto-Ligo, Gafur Muco, Rruga "Thanas Zikó Nr. 56, Tirana
Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Nordurbraut 9, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kubo: Hector Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C. Habana.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LIT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.

LABORKOMISIONOJ

Statistiko: Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj: Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (+32 71) 43.62.05

Eŭropa Komunumo '92 kaj informado en internaciaj pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666.62.66

UN-Jaro de la familio 94: MacGill-Glossop

Gazetara servo: Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36.86.29

Terminologio: K. Smideliusz, Apáczai sétany 10, H-9700 Szombathely; tel. (+36 94) 20.313

Statuto: Oene Hoekstra kaj Rob Moerbeek, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15.65

Ekzamenoj: Marie Hunninck, Centre Culturel „La Charité", BP 136, F-84204 Carpentras

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u.11, H-6500 Kécskemet

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO (Rilatoj de reciproka informado, Kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binennweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj aŭ komputile sur 5,25- colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sistemo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la redaktejo (vidu kovrilpaĝon). Skribu viajn nomon kaj adreson sur la manuskripto.

ABONADO AL IPR KAJ MEMBRIĜO AL ILEI

Membrokotizo 50 Svedaj kronoj.

1) Poŝtĝirkonto 682117-7 (Stockholm). „La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj" (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).

2) Poŝtĝirkonto 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ilek-a de ILEI.